

1983 aprilo
76a jaro
n-ro 928 (4)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



UEA estas sepdekkvinjara

Vi trovos

en tiu ĉi ekscese malfrua numero plurajn aliajn ekcesajn aferojn. En longa teksto sur la paĝoj 63 kaj 64, Corsetti provas instigi ĉiujn tavolojn de la Movado eluzi la ŝancojn, kiujn al ni donas la Monda Komunikado Jaro. T. Goldman polemikas (p. 65) pri la tezoj de H. Welger rilate la motivojn pro kiuj la homoj lernas Esperanton, kaj W.F. Pilger starigas kelkajn malagrablajn demandojn al la Akademio kaj la akademianoj. Margit Evva provas resumi kaj — kredo aŭ ne — ŝi havas bonajn argumentojn por lasi la neesperantistojn invadi la movadajn kongresojn kaj aliajn kunvenojn. Ekscesa cetere estas ankaŭ la amplekso de la recenza rubriko, kaj precipe la partopreno de Leopoldo Knoedt en ĝi (tri tekstoj de li). Alie, kiel vi konstatas en la seka tono de la ĉi-supraj linioj, provizore elĉerpiĝis la flirta stilo de la kunmetanto de ĉi tiu rubriko. Serioze, vi ja ne atendas, ke la redaktoro provu amuzi vin nun, kiam la revuo spertas rekordan prokraston. Meteologoj prognozas belan veteron en Roterdamo dum la venontaj semajnoj.

Enhavo

- 61 75-jara jubileo de UEA: UEA estas simbolo kaj ĉefa portanto de la ideo de Esperanto (Simo Milojević)
- 63 Centjara jubileo de Esperanto: Kiel agi dum la Monda Komunikado Jaro — 1983 (Renato Corsetti)
- 65 Reagoj: Idealismaj motivoj gravas nun ne malpli ol en la tempo de Zamenhof (Thomas A. Goldmann)
- 66 Faka agado: Esperanto-turismo por neesperantistoj (M. Evva)
- 68 Institucio Hodler '68: Denove subvencioj
Informado: Duobligo en kvin jaroj (S. M.)
- 69 Lingvo: Oni ŝanĝu maŝinojn, ne la lingvojn (W. F. Pilger)
- 70 Esperanto en telefonlibroj (K.G. Linton)
- 71 Kongresa komunikado
- 72 Recenzoj: "Ĉu ni kunvenis vane?" de Johán Valano (Klaus Schubert); "Intima triptiko (elektitaj tradukaĵoj)" de diversaj ĉefaj aŭtoroj (Leopoldo H. Knoedt); "Japaneskoj" de Edwin de Kock (Probal Daŝgupto); "Don Juan' Tenorio" de José Zorrilla (Martin Haase); "La ŝtona testamento / Kiven testamenti" de Reino Eriksson (Leopoldo H. Knoedt); "Gardu la pacon!" de Asen Grigorov (Leopoldo H. Knoedt)
- 75 Laste aperis... (Novaj eldonaĵoj en/pri la Internacia Lingvo)
- 76 TEJO-paĝo: Ĉu nova ponto? (Amri Wandel); Novaj aktoraj talentoj (M. Haase)
- 77 Nekrologoj; Fake — Ioke — Persone
- 79 Oficiala informilo
- 80 Anoncetoj

La kovrilo

Okaze de la 75-jara datreveno de UEA, la 15an de aprilo, s-ro A. Peper, la urbestro de Roterdamo, faris en la Urbodomo unuhoran akcepton por la Estraro kaj oficistaro de UEA. Ĉeestis ankaŭ pluraj reprezentantoj de la nederlanda Esperanto-movado kaj kelkaj ĵurnalistoj. Dum la akcepto okazis mallongaj salutparoladoj de la urbestro kaj la prezidanto de UEA, kiu transdonis al la gastiganto la belan poemaron de la fama flandra poeto Guido Gezelle (vidu la kovrilan foton). La fotojn pri la akcepto ni ŝuldas al S. MacGill.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). **Legata en 102 landoj.**

Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo varias laŭlande (Gld. 39; US \$ 18; GM 36; enoj 3150 ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 000, 1/2 p. 530, 1/4 p. 290, 1/8 p. 170, 1/16 p. 110. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50 %. Eksterakvrilaj anoncoj kostas duoble. Ripetrabato 20 %.

Banko: Bank Mees & Hope, Coolsingel 93, 3012 AE Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Ned. poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri financo kaj administrado: s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; ☎ (050) 35 49 35.

Vicprezidanto kaj estrarano pri planado kaj landa kaj regiona agado: d-ro Renato Corsetti, via Collazia 21/1, I-00183 Roma, Italio; ☎ (06) 75 85 679.

Vicprezidanto kaj estrarano pri kulturo kaj edukado: s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavík, Islando; ☎ (91) 3 73 01.

Ĝenerala sekretario: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII, 22., H-7624 Pécs, Hungario; ☎ (72) 23-274.

Estrarano pri informado kaj delegita reto: s-ino Ursula Grattapaglia, Fazenda Escola "Bona Espero", BR-77260 Alto Paraíso (GO), Brazilo; ☎ (061) 226 8101 (en Brasília).

Estrarano pri kongresoj kaj virina agado: s-ino Eliza Kehlet, Heideweg 20, B-2120 Schoten, Belgio; ☎ (03) 651 46 36.

Estrarano pri faka agado: s-ro Petăr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario; ☎ 65 52 43.

Estrarano pri esploroj kaj eksteraj rilatoj: prof Humphrey Tonkin, Stouffer College House, 3700 Spruce Street, Philadelphia, PA 19104, Usono; ☎ (215) 387 8288.

UEA estas simbolo kaj la ĉefa portanto de la ideo de Esperanto

La 28a de aprilo estas la naskiĝtago de Universala Esperanto-Asocio, kiu fondiĝis en 1908, do antaŭ 75 jaroj. Okaze de tiu respektinda jubileo, ni provu difini la signifon de UEA en la historio de la Internacia Lingvo, ni provu loki la festantan organizaĵon en la hodiaŭa Esperanto-movado.

Multrilate la bazaj principoj, kiuj antaŭ trikvarona jarcento inspiris la junan Hector Hodler fondi la Asocion, restas ankaŭ nun la fundamento de la asociaj strukturo, vivo kaj idearo. Kvankam tra la jardekoj okazis pluraj redifinoj de la bazaj celoj de UEA



La urbestro de Roterdamo, s-ro A. Peper (maldekstre), kaj la prezidanto de UEA, s-ro G. Maertens, dum la akcepto okaze de la 75-jara jubileo.

— eĉ la Statuto ŝanĝiĝis plurfoje —, tiuj celoj restas esence samaj nun kiel en 1908. Ni emus aserti, ke tia fideleco al la originaj principoj neniel ŝuldiĝas al pia respekto al la ideo heredaĵo de Hodler, al ia dogmiĝo ene de UEA, sed unuavice al la kvalitoj de la klarvida filozofio de la fondinto de nia Asocio. Kiel ni ofte emas ripete agnoski la geniecon de Zamenhof rilate la fundamentajn principojn de la lingvo Esperanto, tiel same ni devus riverenci antaŭ la genieco de Hector Hodler, kiu patris la plej grandan kaj la plej longdaŭran organizon de la Esperanto-movado. Cetere, Zamenhof mem konsciis pri la graveco de la iniciato de Hodler, kiam li dum la 4a Universala Kongreso, en Dresdeno, nur kelkajn monatojn post la naskiĝo de la nova organizaĵo, diris: „UEA estas sendube la plej grava institucio en nia movado”. Kompreneble, en 1908 tiu deklaro estis esprimo de espero, de revo, kiu plene realiĝis tra la postaj 75 jaroj.

Sendube la plej serioza krizo, kiun travivis la lingvo Esperanto en sia tuta ĝisnuna vivo, estis la t.n. Ido-skismo, kiu furoris senpere antaŭ kaj dum la naskiĝoperiodo de UEA. Kvankam dekomence movada — kaj ne lingva — organizaĵo, UEA tra la jardekoj trudiĝis, en la praktiko, kiel la ĉefa internacia portanto de la tuta, ankaŭ lingva, heredaĵo de Zamenhof. Oni povas facile kredi, ke la Ido-skismo estus neniam okazinta, se UEA estus fondita kelkajn jarojn pli frue, se la interesoj de la lingvo Esperanto kaj de ĝiaj uzantoj troviĝus ankaŭ tiutempe en la manoj de demokrate funkcia internacia organizaĵo, anstataŭ ke ili dependu de suspektindaj ambicioj de unuopuloj. Se en la resto de sia ĝisnuna historio, post la Ido-skismo, la Zamenhofa lingvo ne travivis aliajn seriozajn krizojn, tion oni grandparte povus danki al la ekzisto de la organizita internacia Esperanto-movado, kiun unuavice reprezentas ĝuste UEA.

Ni ja ne forgesas la ekziston kaj la rolon de la Akademio (aŭ de la Lingva Komitato siatempe), en kies laboron UEA ne miksiĝas, sed kiun nia Asocio morale kaj materie apogas. Tamen, tio kio tenas kaj tenas la integrecon de la lingvo, ne nepre estas la dekretoj de la Akademio sed la praktikado de tiuj dekretoj, la observado de ili en la ĉiutaga uzado de la lingvo. Eble la fakto, ke UEA en sia Statuto notas, ke ĝia „oficiala lingvo... estas la Internacia Lingvo Esperanto, tia, kia ĝi estas difinita per sia Fundamento...” kaj la konstanta gardostaro super la skrupula observado de tiu statuta preskribo gravas kaj pezas pli ol ĉiuj tiurilataj deklaroj de la Akademio. Ne estas malfacile kredi, ke tiu ĉi revuo, ekzemple, influas la ĉiutagan vivon de la lingvo pli ol tion faras *Plena analiza gramatiko* aŭ alia normdona verko.


Estas eĉ pli facile difini la rolon de UEA sur la organiza kampo, kaj ne estas kuraĝo aserti, ke multo el la nuna internacia prestiĝo de Esperanto ŝuldiĝas al UEA, eĉ se tio ne estas ĉiam unuavide konstatebla. Tamen, nur naivuloj povas kredi, ke tiu prestiĝo plene kondensiĝis en la parenteza parto de la oficiala nomo de la Asocio — (en konsultaj rilatoj kun Unesko) — kaj preteratenti la fakton, ke la Universalaj Kongresoj (kiujn organizas UEA) funkcias ĉiujare kiel ia stafeta portanto de tiu prestiĝo, nun tra la tuta mondo, kaj ne plu nur tra Eŭropo, kiel iam estis. Kiam ni fieras pri la originala beletro, ni ne rajtas forgesi la stimulan rolon, kiun sur tiu kampo jam de jardekoj ludas Belartaj Konkursoj de UEA; kiam ni parolas pri la Esperanta teatro, ni ne povas preteratenti, ke la Universalaj Kongresoj estis kaj restas la

ĉefa teatra scenejo de la Movado. Tre verŝajne en la proksimaj jaroj UEA komencos ludi elstaran rolon ankaŭ sur la kampo de la scienca aplikado de Esperanto, pere de la nova Oficejo en Budapeŝto.

Kompreneble, ni povus daŭrigi la liston de tiaj ekzemploj, sed tio nun ne havas grandan sencon, ĉar nur kelkiuj (eĉ se tre laŭtaj) pridubas la gravecon de UEA en la vivo de la Internacia Lingvo kaj de la Esperanto-movado.

Leviĝas ja demando pri la estonta rolo de UEA, t.e. foje oni levas tian demandon kaj asertas, ke la Movado ne plu bezonas tian centran institucion. Kutime aperas nur tiaj asertoj sen samtempa klarigo, kio do estas tio alia, kion la nuna Movado ja bezonus. Ĝis venos tiusencaj alternativaj proponoj, ĝis la internacia Esperanto-movado ekzamenos ilin kaj interkonsentos pri eventuala nova formo de internacia organiziĝo, UEA konservu la rolon, kiun ĝi nun havas. Tio neniel malhelpas konstantan reviziadon de tiu rolo kaj daŭran klopodon adaptiĝi al la postuloj de la ŝanĝiĝantaj cirkonstancoj en la mondo kaj, sekve, ankaŭ en la Movado. Ni ja facile povas imagi, ke ger-

sian 50-jaran jubileon, ĝi havis 25 aliĝintajn landajn asociojn, 1 aliĝintan kaj 13 kunlaborantajn fakajn asociojn; en tiu jaro la Asocio nombris 27 138 individuajn kaj aligitajn membrojn. Okaze de la 75-jara datreveno la Asocio montras jenajn atingojn sur la sama kampo: 44 aliĝintaj landaj asocioj, 5 aliĝintaj kaj 26 kunlaborantaj fakaj asocioj, 36 624 individuaj kaj aligitaj membroj. Vi facile rimarkas la kreskojn, kiuj ankoraŭ ne spegulas la veran staton (ekzemple pri la potenciala membronombro), ĉar multaj ekstermovadaj faktoroj malhelpas tion. Jen bela ekzemplo tiurilate: Laŭ fidindaj informoj, nun en Ĉinio la Internacian Lingvon lernas 100 000 homoj; Ĉina Esperanto-Ligo estas aliĝinta landa asocio de UEA, sed estas absurde atendi, ke ĝi en la venontaj jaroj anoncu al UEA plurajn dekmilojn da membroj, ĉar laŭ la nuna monda ekonomia ordo, Ĉinio ne sukcesas trovi la necesajn dekmilojn da guldenoj por pagi la membrecon en UEA. Tamen, almenaŭ en ĉi tiu kunteksto kaj en ĉi tiu jubilea okazo ni konsciu, ke Ĉina Esperanto-Ligo en UEA reprezentas ĉiujn dekmilojn da ĉinaj esperantistoj, reprezentas ilin morale, se jam



La urbestro de Roterdamo alparolas la funkciulojn kaj oficistojn de UEA dum la akcepto la 15an de aprilo.

manoj aŭ poloj, ekzemple, povus koncepti sian agadon por Esperanto sen UEA, sed multaj landoj, eĉ kontinentoj (Afriko kaj Azio, ekzemple) bezonas kaj ankoraŭ longe bezonas la helpon, kiun ili nun ricevas de nia Asocio. Cetere, estas almenaŭ strange, ke ni en la Movado kapablas pensi pri internacia malorganiziĝo nun, kiam la mondo ĉirkaŭ ni faras (eĉ je la nivelo de la ŝtatoj) ĝuste malajn klopodojn.

Ĉiuj ĉi demandoj leviĝas nur ĉe tiuj kiuj ankoraŭ kredas, ke UEA estas ĝia Estraro aŭ la Centra Oficejo. Se oni daŭre tenas en sia memoro, ke UEA fakte estas la grandega plimulto de la aktiva esperantistaro en centoj da landoj tra la mondo kaj, ke ĝi ĉiam povas fariĝi tio, kion tiu plimulto volas ke ĝi estu, tiam la tuta demando pri la aktualeco de la internacia movada organiziĝo estas komplete superflua.

Ĉu UEA kreskas? Ĉu ĝi evoluas? Komparu pri tio la sekvantajn faktojn: En 1958, kiam la Asocio festis

ne eblas ke tio ordiĝu ankaŭ finance. Simile estas ankaŭ pri pluraj aliaj landoj, kaj precipe pri tiuj, en kiuj la Internacia Lingvo havas plej multajn adeptojn. Sekve, UEA efektive estas multe pli granda kaj konsiderinde pli reprezenta, ol tion kapablas indiki la disponeblaj kotizaj librotenaĵoj.

La materia bonfarto de UEA neniam en la pasintaj 75 jaroj estis tiel sekura, kiel okazas nun spite la tutmondan ekonomian krizon. Vi informiĝos pri tio pli detale en la Estrara Raporto (en la maja revunumero).

Fine, ni neniel volis, ke tiu ĉi okaza teksto signifu, ke nenio en la nuntempaj vivo kaj agado de UEA estas kritikinda. Kontraŭe, estas tuta aro da kritikindaj kaj plibonigendaj aspektoj de la asocia laboro. Sed kritiki signifas ankaŭ plukonstrui. La jubileanta UEA meritas (kaj bezonas) tian plukonstruan atenton de la tutmonda esperantistaro.

sm

Kiel agi dum la Monda Komunika Jaro — 1983

Post la komenca artikolo en la januara numero de ĉi tiu revuo pri la agado lige al la Centjara Jubileo de Esperanto, ni planas de tempo al tempo aperigi tekstojn pri unuopaj punktoj de la agadprogramo, kiun siatempe aprobis la Komitato de UEA. Tiun agadprogramon nun realigas ĉiuj partoj de la Asocio (landaj kaj fakaj organizaĵoj, individuaj membroj, oficejoj, estraro, komisionoj), kaj la laboron komencas partopreni ankaŭ tiuj movadaj instancoj, kiuj ne estas rekte ligitaj kun UEA (lokaj grupoj, diversaj regionaj centroj, bibliotekoj, unuopuloj).

Ĉi-foje ni donas la prioritaton al la Monda Komunika Jaro pro memevidentaj tempaj kialoj. Kun iom da teknikaj modifoj, ni represas ĉi-sekve la koncernan parton de la agadprogramo kaj konsilojn, kiujn donas la broŝuro *Kiu faru kion; Gvidilo por plenumo de la programo pri la Centjara Jubileo de Esperanto*. La broŝuro estas havebla kontraŭ aŭ frankokostoj (2 internaciaj respondkuponoj) de la Centra Oficejo de UEA.

Plenumontoj kaj agadoj: Kiu faru kion?

En novembro 1981, la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj proklamis la jaron 1983 Monda Komunika Jaro. UEA lanĉis sian propran programon de la agado okaze de tiu Jaro; la programo signas formalan komencan periodon de la kvinjara agado lige al la Centjara Jubileo de Esperanto. Jen la proponita disdivido de la taskoj:

UEA (tio estas ĝiaj estraro, oficistoj kaj apartaj komisiitoj):

- kontaktu kun Unesko, Internacia Telekomunika Unio (ITU) kaj neregistaraj internaciaj organizaĵoj, por konsciigi ilin pri la graveco de la lingva demando kaj specife pri eventuala utileco de Esperanto en la komunika teknologio, kaj por kunlabori kun tiuj organizaĵoj pri komunaj aranĝoj;

- (re)eldonu *Esperanto-dokumenton* pri la temo;

- faru katalogon de ekzistantaj materialoj en Esperanto pri la temo kaj pretu distribui ĝin fotokopie;

- organizu prelegojn kaj debatojn pri la temo okaze de la Universala Kongreso en 1983;

- instigu per artikoloj kaj cirkuleroj al aliaj agadoj ĉi-rilataj.

Fakaj Esperanto-organizaĵoj kaj sendependaj Esperanto-Centroj (tio estas iliaj gvidorganoj):

- organizu programon pri la Monda Komunika Jaro en la kadro de siaj internaciaj kongresoj kaj renkontiĝoj;

- aperigu artikolo(j)n pri la temo en sia revuo;

- instigu siajn membrojn kaj landajn sekciojn al aliaj agadoj ĉi-rilataj.

Esperanto-gazetaro (tio estas redaktoroj de Esperanto-periodaĵoj kaj radioprogramoj):

- aperigu artikolojn pri la temo komence de la Jaro, tiel ke lokaj Esperanto-grupoj kaj unuopuloj povu utiligi ilin en sia agado;

- instigu neesperantistan fakulon aŭ ĵurnaliston verki pri komunikado, por aperigi tion en Esperanta traduko.

Landaj asocioj (tio estas la estraroj kaj komisiitoj de la landaj Esperanto-organizaĵoj):

- traktu la temon dum sia landa kongreso aŭ en aparta seminario dediĉita al la Monda Komunika Jaro;

- invitu eksterajn parolantojn (ekz. konatan politikiston aŭ funkciulon de interŝtata organizaĵo) por prezenti la temon;

- aperigu artikolo(j)n pri la temo en sia revuo;

- mendu sufiĉan kvanton da fotokopiita materialo pri la Jaro por enlanda distribuo (la mendojn direktu al: Esperanto-Centro, Jubilea Jaro, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio);

- instigu siajn lokajn grupojn al plenumado de taskoj ligitaj al ĉi tiu temo;

- aperigu nacilingvan broŝuron pri internacia komunikado (eventuale per traduko de UEA-materialo) kaj vaste distribuu ĝin enlande al neesperantistoj.

Lokaj grupoj (tio estas la estraroj de lokaj, urbaj, lerneaj, fabrikaj Esperanto-klubo):

- aranĝu prelegon por la membroj de sia klubo, utiligante materialon de UEA aŭ tiun kiu aperis en la Esperanta gazetaro;

- aranĝu prelegon en la nacia lingvo, kunlabore kun interesita loka asocio (ekz. Unesko-klubo, ĵurnalista asocio aŭ simile);


- organizu ekspozicion pri la temo.

Unuopaj esperantistoj havigu al si la materialon pri la temo, trastudu ĝin, por aktive kunlabori en sia loka grupo pri la plenumado de ties taskoj.

Tezoj por la kongresa pritrakto de la temo

La centraj instancoj de UEA jam realigis aŭ nun okupiĝas pri sia parto de ĉi tiu programo. Oni jam kontaktis diversajn internaciajn organizaĵojn (i.a. Unesko kaj ITU); estas preta la kolekto de la ekzistantaj materialoj pri la temo; reeldoniĝis la *Esperanto-dokumento* n-ro 11, *La lingvo kaj la rajto je*

La moderna tekniko povas helpi, sed ĝi ne kapablas radikale solvi plurajn bazajn problemojn de la komunikado, ĉar tiuj problemoj ne estas nur teknikaj: Satelita stacio en Venezuelo por televida, telefona kaj teleksa komunikado.



komunikado; oni nun planas ampleksan pritrakton de la temo "Sociaj kaj lingvaj aspektoj de la moderna komunikado" en la kadro de la ĉi-jara Universala Kongreso en Budapeŝto. Ni represas ĉi-sekve parton de la informilo pri la kongresaj kunsidoj dediĉotaj al la temo, des pli ke la landaj asocioj kaj lokaj grupoj povus en tiu materialo trovi ideojn por siaj aranĝoj lige al la Monda Komunikajaro.

La ĉi-jara UK traktos la kongresan temon multe pli amplekse, ol oni tion kutime faras. Dum la Kongreso, apartaj sekcioj esploros la rilatojn inter la teknikaj (nunaj kaj estontaj), sociaj kaj lingvaj aspektoj de la komunikado. La Kongreso donos eblecon ankaŭ al nemovadaj fakaj organizaĵoj kaj unuopuloj, kiuj okupiĝas pri la komunikado, konigi sian opinion aŭ prezenti siajn rezultojn en formo de prelego aŭ ekspozicio.

Kvankam Esperanto estos, kompreneble, la laborlingvo de la Kongreso, en kelkaj sekcikunsidoj estos eble uzi ankaŭ la francan, hungaran, anglan kaj rusan lingvojn, ĉar samtempa interpretado estos prizorgita. Helpe de fakaj organizaĵoj kaj instancoj, dum la Kongreso oni planas aranĝi ampleksan ekspozicion pri komunikiloj.

En la kadro de la kongresa temo oni planas trakti jenajn aspektojn de la komunikado:

— Estonteco de tradiciaj komunikadaj metodoj (libroj, gazetaro, radio, televido, komunikadaj retoj, filmo, sona kaj bilda registrado, arto);

— La efiko de elektroniko sur la amaskomunikadon (tutmonda komunikado, loka kaj regiona komunikado, kreado de unueca elektronika inform-kaj komunik-sistemo);

— Disvastigo de sciencaj kaj kulturaj valoroj (informo kiel varo, informa dependeco inter nacioj kaj ene de nacio, stokado, retrovado kaj transigado de informo);

— Perspektivoj de komunikado inter homo kaj maŝino (programadaj lingvoj, aplikado de homaj lingvoj: naciaj lingvoj kaj Esperanto, perva komunikado);

— Telekomunikaj informservoj (en la privata sfero, en la sfero de socia vivo, en la teknika kaj ekonomia afero: produktado, komerco, sciencaj esploroj);

— Lingva malegaleco – lingva egalrajteco (demokratia sistemo de komunikado, nova internacia informada ordo kaj la rolo de Unesko, la rolo de komunikado en la plifortigo de kunlaboro kaj interkompreniĝo inter la popoloj, kontribuo de "malgrandaj" popoloj al la monda kulturo);

— La rolo de Esperanto en la klopodoj transponti la lingvajn barojn en la internacia komunikado (en privataj kontaktoj, sur la kampo de la scienca kaj faka kunlaboro, en komerco kaj turismo).

Esperantistoj, fakuloj, kiuj deziras partopreni ĉi tiujn sekcikunsidojn, estas petataj aparte anonci sin, menciante siajn kvalifikojn kaj la sferon de komunikado kun kiu ili estas ligitaj. Se vi volas prelegi, bonvolu sendi resumon de via prelego al LKK (pf. 193, H-1368 Budapest) plej malfrue ĝis la 1-a de julio 1983. LKK volonte akceptos ankaŭ sinanoncojn por la interpreta servo dum ĉi tiuj sekcikunsidoj. Se vi konas elstarajn fakulojn pri diversaj aspektoj de la kongresa temo, eĉ se ili ankoraŭ ne estas esperantistoj, bonvolu instigi ilin kontribui al la pritrakto de la temo. Laŭ via peto, LKK volonte sendos kvanton da tiurilataj informiloj en la franca, hungara, rusa kaj angla lingvoj.

Konklude, oni povus diri, ke ĉi-jare prezentiĝas aparte multnombraj kialoj por paŝi eksteren, sub la ŝildo de la Monda Komunikajaro. Kiu ne faros tion, tiu poste ne riproĉu la mondon, ke ĝi estas indiferenta pri Esperanto.

Kompilis
Renato Corsetti


Idealismaj motivoj gravas nun ne malpli ol en la tempo de Zamenhof

En nia numero de decembro 1982 (p. 205) aperis ampleksa kontribuaĵo de la germana juristo kaj psikologo Helmut Welger, sub la titolo "Ses psikologiaj tezoj pri la motivoj por lerni Esperanton". Ni ricevis kelkajn reagojn pri tiu teksto kaj decidis aperigi tiun de d-ro Thomas A. Goldman, prezidanto de Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko. D-ro Goldman, kiu ne estas psikologo sed ekonomikisto, demandas tiujn tezojn de Welger, kiuj rilatas la nociojn "utilo" kaj "bezono", kaj kiuj estas familiaraj en la ekonomiko ne malpli ol en la psikologio.

La tezoj de s-ro Helmut Welger vere ne estas akcepteblaj. Malgraŭ bonaj intencoj kaj nedisputebla sincero, li misuzas kaj distordas la eltrovojn de psikologia scienco. Sekve, liaj konkludoj estas malklaraj kaj misgvidaj. Liaj unuaj kvin tezoj volas devolorigi la rolon de idealismo kiel motivo por lernado de Esperanto, sed lia Tezo 6(a) revalorigas ĝin sub la nomo de "grupaneco" kaj la Interna Ideo.

Refuto fakte postulas nur du difinojn, nome:

Difino 1: *Utilo* – Ĉio kio iel produktas agrablan senton por specifa persono.



D-roj Ferenczy (maldekstre) kaj Shinoda: Kie estas la limo inter idealismo kaj utilo en la Esperanta agado?

Difino 2: *Bezono* – Ĉia antaŭvidata utilo.

Rimarko: En la ordinara, eksterfaka uzado de tiuj du terminoj, ili rilatas al praktikaj aŭ materiaj celoj. En la psikologia scienco ili havas multe pli vastan signifon, kiel indikas la difinoj. La kialo de tio estas la konstato, ke homaj agoj ofte ne havas praktikajn aŭ materiajn celojn. Homo, kiu ŝvitis kaj batalis por gajni iom da mono, tamen donas moneron al almozetanto aŭ donacas milojn al eklezio aŭ fondaĵo. Sportisto suferas la plej severajn dolorojn por la kontentiĝo per venko en ludo.

Se oni aplikas la ĉi-suprajn difinojn al la frazoj de Welger: "La homoj pretas lerni la plej malfacilajn lingvojn, se ili opinias, ke tio sufiĉe utilos al ili" kaj "Tiu utilo estas... la eblo kontentigi... bezonojn", ili tradukiĝas al la simpla propozicio: "La homoj faras tion kio plaĉas al ili." Tia konkludo ne estas tre surpriza, certe ne ŝoka. Restas la fundamenta demando: **Se mi donas moneron al almozetanto, kial tio plaĉas al mi?**

En sia Tezo 6, Welger mencias la koncepton de memestimo. En la psikologia scienco, la iom pli vasta koncepto de sinbildigo ludas gravan rolon.

Difino 3: *Sinbildigo* – La koncepto kiun havas ĉiu homo pri sia propra personeco.

Rimarko: La ordinara homo sin konsideras normale virta. Se li aŭ ŝi konservas sian sinbildigon de virtul(in)o, li aŭ ŝi plialtigas sian memestimon. Tio produktas agrablan senton, do donas utilon.

Homamo, sinofero, sindediĉo, malavareco, kompato estas en multaj sociaj virtoj, dum egoismo, avarico, krueleco estas malvirtoj. Kiam mi donas moneron al almozetanto, mi pruvas al mi mem, miajn homamon, malavarecon, kompaton kaj oferemon.

Tiel mi kontentigas fundamentan bezonon.

Tial la avarulo diras ke li estas "ŝparema", la egoisto sin konsideras "singarda, zorgema", kaj la tirano parolas pri "disciplino kaj ordo".

Responde al la tezoj de Welger, mi prezentas du tezojn:

Tezo 1: La motivo de homa ago estas pli ofte miksaĵo ol unikaĵo.

Rimarko: Homoj kutime lernas lingvon kun la intenco uzi ĝin, sed la elekto de lernota lingvo kaj la dedico eklerni ĝin ofte dependas ne nur de la praktikaj aspektoj. En la 18a jarcento, junuloj studis la latinan kaj klasikan grekan lingvojn tute ne pro praktikaj sed pro sociaj motivoj. (Puŝkin diris pri Onjegin: "La latina elmodiĝas nun, tiel, se mi diru al vi la veron, li konis sufiĉe la latinan por klarigi epigrafojn.") Ni devas do demandi, kian utilon alportas la lernado de Esperanto, kiujn "aktualajn, personajn kaj forte sentatajn bezonojn" ĝi kontentigas.

Ni certe konstatos, ke – apud pure praktikaj celoj – idealismaj motivoj troviĝas inter la bezonoj "aktuale" kontentigeblaj. La fina venko de Esper-

anto estas, eble, en la estonteco, sed la **kontribuado** al tiu estonta celo havas utilon hodiaŭ.

Tezo 2: Ju pli la miksaĵo de motivoj por iu ago akordas kun la sinbildigo de la aganto, des pli forte ĝi efikas.

Rimarko: Virtaj agoj akordas kun la sinbildigo de preskaŭ ĉiuj homoj, kaj tial ni konstatas, ke homoj ne malofte faras personajn oferojn "por la bono de estontaj generacioj", aŭ "por la bono de l' homaro". La tezoj de Welger celas nei tion, surbaze de la terminoj "utilo" kaj "bezono". Ke idealismaj motivoj influas nuntempajn homojn lerni Esperanton, tio estas ne malpli certa afero, ol ke tiaj motivoj inspiris d-ron Zamenhof krei la Internacian Lingvon.

Tre interesa ekzemplo estas la sperto de usonaj esperantistoj, laŭ kiu la neŭtraleco de Esperanto estas grava argumento ĝuste inter usonanoj! Kiel parolantoj de la angla, usonanoj ĝuas privilegian

pozicion. Lernante la Internacian Lingvon, ili oferas siajn privilegiojn por la bono de aliaj homoj ("por la bono de l' homaro"). Tio, por multaj – sed ne por ĉiuj – usonanoj, akordas kun ilia sinbildigo de homama, oferema persono, kaj ĝi tial plialtigas la memestimon.

S-ro Welger revenas al ĉi tiu koncepto en sia lasta tezo, sed li tro limigas kaj malvastigas ĝin en la kadro de "grupaneco". Se ni ne bone komprenas la radikojn de la idealismo en la homa psiko, ni malhelpas niajn proprajn klopodojn disvastigi la Internacian Lingvon.

Finante mi diru, parenteze, ke mi persone opinias, ke la praktikaj aspektoj de la Internacia Lingvo kaj de nia movado bezonas multe pli fortan emfazon kaj apogon ol ili nuntempe ricevas. Tamen, mi firme kredas, ke tio devas okazi en la kadro de sciencaj faktoj kaj sociaj realaĵoj.

Thomas A. Goldman

FAKA AGADO

Esperanto-turismo por neesperantistoj

Se oni parolas pri turismo, ni aŭdas oftan intermikson de la diversaj sencoj de tiu vorto. La esprimo en la publika uzo ĝenerale signifas turistikon, naturamikecon, kaj la turisto mem ŝajnas esti homo, kiu grimpas sur montojn, vagas tra ebenaĵoj kaj valoj ktp. Kvankam ankaŭ la naturamikeco apartenas al la granda tereno de la turismo, la esprimon oni nuntempe ĝenerale uzas por esprimi tiun grandan trafikon, en kies kadro la homoj vojaĝas tien kaj reen, de unu loko al la alia, de unu lando al la alia. Sed ankaŭ en tiu signifo la vorto turismo havas du sencojn: 1. individua turismo; 2. komuna aŭ grupa turismo.

Antaŭ pluraj jardekoj, kiam la homoj komencis senti la praktikan valoron de Esperanto, inter la esperantistoj naskiĝis nova kutimo: la individua turismo. Ili havis korespondamikojn en diversaj lokoj tra la mondo, kaj pere de siaj geamikoj ili komencis vojaĝi eksterlanden. Tie oni gastigis ilin, donis trankvilon, manĝon – do ĉion, kio estis bezonata –, kontraŭ reciproka gastigo. La vojaĝantoj poste invitis la gastigantojn al siaj hejmoj, promesante al ili similajn kondiĉojn. Tio estis bona kaj sufiĉe malmultekosta maniero por eksterlanda vojaĝo, ĉar, kompreneble, hejme ĉio estas malpli kosta, ol en eksterlando. Ni povas diri, ke tiu individua turismo havas inter esperantistoj ankaŭ nun multajn sekvantojn. Tamen, ĝi havas valoron nur kiam oni ambaŭflanke traktas ĝin serioze.

La lastatempa krizo en la tuta mondo ĉiam plimalfaciligas ankaŭ tiaspecajn vojaĝojn. Krome, nuntempe vojaĝas sammaniere ankaŭ tiuj esperantistoj, kiuj en la lando al kiu ili intencas iri tute ne havas ami-

kajn aŭ konatojn. Ili simple prenas la Jarlibron de UEA, elserĉas kelkajn adresojn, skribas al tute nekonataj homoj kaj petas helpon dum sia restado en la koncerna lando. Kompreneble, ankaŭ tiaj kontaktoj povas esti rezultodonaj. Tamen, fremdaj homoj – kvankam ili estas esperantistoj – ne ĉiam staras volonte je dispono de fremdlanda vagabonda esperantisto. Prave, des pli ke la delegita reto de UEA ne havas tian celon.

Alia tereno de la individua turismo estas la partopreno en diversaj Esperanto-aranĝoj. La homoj elektas kongreson aŭ seminarion, skribas al la organiza komitato, petas informojn kaj skribas, ke ili pagos ĉion post la alveno, surloke. Se ni sincere traktas la aferon, ni povas diri, ke 75% de tiaj aliĝantoj estas seriozaj personoj, ili akurate alvenas kaj pagas surloke. Tamen, ĉiam restas tiuj aliaj 25% de la aliĝantoj, kiuj aŭ tute ne alvenas – sen iu ajn informo – aŭ ili ja alvenas kaj klarigas, ke ili havas pagmalfacilaĵojn, ne pro sia malseriozeco, sed pro sialandaj fremdvalutaj reguloj. Sed la organiza komitato de la koncerna Esperanto-aranĝo devas ankaŭ por tiuj 25% antaŭmendi kaj ofte antaŭpagi la tranoktadon kaj manĝadon. Tial la foresto de tiuj 25% povas kaŭzi al la aranĝantoj grandajn financajn malfacilaĵojn, kelkfoje eĉ tute grandan deficiton.

Pro la amaso de vojaĝantaj esperantistoj kelkaj vojaĝoficejoj komencis interesiĝi pri Esperanto, kiel helplingvo en la turismo. Antaŭ dek jaroj el Pollando venis la unua pli nova iniciato uzi Esperanton kiel oficialan lingvon en la turismo. La vojaĝoficejo "Juventur" el la urbo Bydgoszcz komencis sendadi grupojn

al diversaj Esperanto-aranĝoj en Hungario, Bulgario kaj Ĉeĥoslovakio, kun Esperantaj gvidantoj. Dum tiu 10-jara periodo "Juventur" evoluis al la nun funkcia vojaĝagentejo "Esperantotur" en Bydgoszcz, kiu – ni povas diri – estas la unua el la nunaj turismaj agentejoj kun Esperanto kiel oficiala lingvo. Preskaŭ samtempe, similajn klopodojn oni faris ankaŭ en Bulgario, kie tiam estis fondita Internacia Esperanto-Kursejo, nun funkcia en la urboj Smoljan kaj Varna. En tiu kazo, tamen, ne temis nur pri turismo, sed ankaŭ pri la instruado de Esperanto dum la koncernaj turismaj aranĝoj.

Sed tio tamen estis nur la komenco. Antaŭ kelkaj jaroj fondiĝis ankaŭ la vojaĝoficejo "Suno kaj Maro" en Milano (Italio), Esperanta FERIA Asocio en Ipswich (Britio), vojaĝoficejo de ELNA (Usono), kaj multaj aliaj societoj kaj asocioj komencis interesiĝi pri Esperanto-turismo.

Esperanto en la koncerna jaro. Esperanto-Sekcio de "Express" akceptas eksterlandajn Esperanto-grupojn en Hungario, kaj sendas Esperanto-grupojn eksterlanden. La grupoj ĉiam havas Esperantan gvidanton, ankaŭ kiam ili konsistas nur el esperantistoj. Kompreneble, "Express" volonte okupiĝas ankaŭ pri individuaj esperantistoj, kiuj intencas viziti Hungaron.

Tamen, ni denove devas insisti pri la diferenco inter la esperantista turismo kaj Esperanto-turismo. Se iu vojaĝoficejo sendas grupon konsistantan nur el esperantistoj, tio estas esperantista turismo. Sed, se ĝi sendas grupon neesperantistan kun Esperanta vojaĝgvidanto – kaj se ankaŭ la gvidanto ĉe la akceptanta flanko estas esperantisto –, tiam temas pri Esperanto-turismo.

Multaj esperantistoj grumblas, se en iu aranĝo aperas grupo en kiu nur la gvidanto parolas Esperant-



Foto: Jovan Ošap

***Dum kongresa ekskurso:
Ĝis kia grado oni aliĝas al
la Universalaj Kongresoj
pro turismaj celoj?***

En 1980 okazis en Manilo la Monda Turisma Konferenco, kies fina dokumento – la Deklaracio de Manilo – apogis la utiligon de Esperanto en la turismo. (Vidu ĉi tiun revuon de januaro 1981, p.2). De tiu tempo ĉiam pli kreskas la intereso pri Esperanto en la turismaj aferoj.

La vojaĝoficejo "Rekrea" en Prago (Ĉeĥoslovakio) faris fine de 1981 interkonsenton kun Ĉeĥa Esperanto-Asocio por sendi kaj akcepti Esperanto-grupojn. Antaŭ unu jaro ankaŭ en Hungario okazis simila paŝo: estis fondita Esperanto-Sekcio de la vojaĝoficejo "Express" en Budapeŝto. Tiu sekcio havas kontaktojn eksterlande kun diversaj vojaĝagentejoj, kiuj utiligas Esperanton, kaj enlande ĝi (kune kun la Turisma Komisiono de Hungara Esperanto-Asocio) kunlaboras pri Esperanto-turismo kun la turismaj aktivuloj de la teritoriaj komitatoj de HEA. La sekcio ĉiujare post la fino de la sezono transdonas al tiuj teritoriaj komitatoj la nomaron de tiuj, kiuj el ilia regiono vojaĝis eksterlanden pere de

on, kaj la aliaj komprenas nenion. Pro kio tia grupo venis partopreni Esperanto-aranĝon? La respondo estas tre facila: ni devas malfermi la pordojn!

Se la esperantistoj ĉiam renkontas nur unu la alian, se kontaktoj okazas nur interne de la esperantista rondo, tio povas esti tre agrabla, sed tio tamen ne estas propagando de Esperanto kaj ĝiaj praktikaj valoroj al la eksteruloj. Se la homoj, la neesperantistoj, sentas la etoson de iu Esperanto-kunveno, kaj suferas pro tio, ke ili nur pere de sia gvidanto povas interkompreniĝi kun alilandanoj, ĉe ili certe vekiĝos la intereso pri Esperanto. Ĝuinte, eĉ nur parte, la agrablan atmosferon de bone organizita aranĝo, tiuj eksteruloj sopiros reveni, kaj ili scios, ke oni nur pere de Esperanto povas sperti ion similan.

Kompreneble, ni restu realismaj kaj ni ne kedu, ke ĉiuj tiuj eksteruloj tuj lernos Esperanton. Se tion faros nur kelkaj procentoj de tiuj neesperantistoj, kiuj vizitas Esperanto-aranĝojn, tiam la Movado gajnos centojn da novaj adeptoj. Ni memoru, ke el la

jamaj esperantistoj ne estas bezonate fari esperantistojn!

Se ni volas disvastigi la Movadon, ni devas malfermi la pordojn kaj eliri la fermitan rondon. Bonan ekzemplon ĉi-rilate liveris, en marto ĉi-jare, la Printempa Festivalo en Budapeŝto, al kiu "Express" invitis por 5-taga restado siajn partnerojn, inter kiuj ankaŭ tri esperantistojn. Dum la festa inaŭguro, kiam la ĉefdirektoro de "Express" salutparolis, lian paroladon ni tradukis flufrante al diversaj partneroj en 10 lingvoj. Tiu flufrado iĝis tiel granda bruoj, ke ni preskaŭ ne povis kompreni la vortojn, kiujn ni devus interpreti.

Dum tiu 5-taga restado evidentiĝis, ke Esperanto ne estas multe konata inter la aliaj partneroj de "Express", kaj aŭskultante nin, ĉiu el ili demandis en kiu lingvo ni parolas. Ni komprenoble – pere de la interpretistoj – klarigis la nuntempan situacion de Esperanto en turismo, kaj niaj gastoj ekinteresiĝis.

Samtempe – kaj tio estas menciinda – dum tiu budapeŝta kunveno unuafoje la oficialaj turismaj kontaktoj inter la diverslandaj partneroj de Landa Turisma Oficejo okazis en Esperanto.

Ni do ne grumblu kontraŭ la neesperantistoj en la Esperanto-aranĝoj, ĉar ankaŭ ni ĉiuj iam estis en ilia situacio. Ni lernu ne nur "toleri" ilin, sed ni ankaŭ uzu la okazon por informi ilin pri Esperanto kaj ni helpu al ili sperti la praktikajn valorojn de la Internacia Lingvo. Ni tiel plej efike helpas la disvastigon de Esperanto en la turisma medio. Kiam ni mem vojaĝas eksterlanden, ni provu utiligi la servojn de tiuj kelkaj vojaĝagentejoj, kiuj kuraĝis vicigi Esperanton inter la lingvoj en kiuj ili prizorgas sian internacian turisman agadon.

Margit Evva

INSTITUCIO HODLER '68

Denove subvencioj

Dum sia kunsido la 16an de aprilo en Roterdamo, la estraro de Institucio Hodler, decidis asigni la sekvantajn subvenciojn al jenaj fondaĵoj kaj instancoj: Fondaĵo Azio-Afriko de UEA – 2 000; Fondaĵo Canuto de UEA – 1 500; Akademio de Esperanto – 1 000; Jugoslavia Esperanto-periodaĵo *Voĉo* – 500; Nederlanda Societo de Blindaj Esperantistoj – 500 gld. Kiel konate, la Institucio pasintjare tute ne atribuis subvenciojn pro la aĉeto de sia domo en Antverpeno. Fakte, la ĉi-jaraj subvencioj venas parte el tiurilata rezervo farita en 1981. Se Institucio Hodler sukcesos baldaŭ vendi sian loĝdomon en Roterdamo (ne temas komprenoble pri la Domo de UEA), tiam ĝiaj kontoj repleniĝos per interezokrea mono kaj oni

atendas, ke la subvencioj en 1984 denove estos pli altaj kaj pli multnombraj.

Pro la foriro de la ĝisnuna administranto, d-ro Sadler, la estraro traktis ankaŭ la demandojn pri lia anstataŭanto. Oni venis al jena solvo: la financan administradon (librotenadon) faros ekde nun s-ino J. ten Hagen el Amsterdamo, dum en la korespondado pretas helpi unu el la estraranoj de la Institucio, s-ro Hans Bakker (filo), kies adreso do fariĝas ankaŭ korespondadreso de Institucio Hodler (Kastelenstraat 231-II, 1082 EG Amsterdam, Nederlando).

Ekde la 1-a de aŭgusto ĉi-jare, la estraro de Institucio Hodler havos novan konsiston. La nuna prezidanto de tiu estraro, s-ro E.J. Woessink (Nederlando), decidis retiriĝi (pro malboniĝinta vidkapablo), sed li tamen pretas ankaŭ estonte roli kiel konsilanto, tasko kiun li jam de multaj jaroj plenumas ne nur en la Institucio sed ankaŭ en UEA ĝenerale. La oficon de la prezidanto transprenos d-ro Renato Corsetti (Italio), plufunkcios la ĝisnunaj membroj de la estraro, s-roj H. Bakker (filo) kaj J. Verstraeten (Belgio), kaj aldoniĝos du novaj estraranoj, s-roj A. Mertens Goossens (Belgio) kaj R.W.J. Hubers van Assenraad (Nederlando). Ambaŭ novaj estraranoj estas profesiaj bankistoj.

INFORMADO

Duobliĝo en kvin jaroj

Der Esperantist (La esperantisto), dumonata revuo de Esperanto-Asocio en Kulturligo de Germana DR, apartenas al la plej seriozaj landaj Esperanto-gazetoj en la Movado. Tamen, tiu 24-paĝa, dense kompostita, malgrandformata, neilustrita kajero (nun abonebla ankaŭ ĉe UEA kontraŭ 10,50 gld. jare) estas ankaŭ unu el la pli kuriozaj Esperanto-periodaĵoj. Diference de ekz. nia revuo, kies redakcio kaj legantoj panikas pro foja kelksemajna malfruo, *Der Esperantist* ĉiam malfruas kaj aperas — kvazaŭ planite — kun proksimume sesmonata prokrasto. Ĝus atingis nin la numeroj 5 kaj 6 de 1982.

Kvankam do la freŝeco de la novaĵoj ne apartenas al la virtoj de *Der Esperantist* (ĉar oni, ekzemple, en unu el la ĵus aperintaj numeroj legas la rezoluciojn de la pasintjara UK en Antverpeno), la gazeto tamen estas interesa. Ĝi tute skrupule kronikas la landan movadon, iom emfaze prezentas la agadon en aliaj orienteŭropaj ŝtatoj, foje donas ekscesan atenton al nemovadaj temoj, kiuj eventuale interesas ĝian enlandan legantaron. Tamen, ne maloftas en tiu periodaĵo seriozaj esperantologiaj studoj, artikoloj pri la movada historio kaj detalaj superrigardoj kaj

analizoj. Unu el tiuj lastaj instigis nin okupiĝi pri *Der Esperantist* ĉi-foje.

Temas pri kvarpaĝa listo, en la n-ro 115 (5/1982), sub la titolo "La gazetaro pri ni 1981". Tie oni vicigas laŭ la distriktoj, titoloj, datoj kaj temoj ĉiujn 68 nacilingvajn ĵurnalojn kaj revuojn, kiuj en 1981 aperigis 286 artikolojn pri Esperanto. Fakte, tio kio el la malfrua superrigardo faras aparte interesan novaĵon, estas kompara tabelo pri la evoluo de la gazetara informado pri Esperanto en Germana Demokratia Respubliko en la periodo de 1976 ĝis 1981.

Ni vidas tie, ke en 1976 entute 33 gazetoj aperigis 77 artikolojn pri Esperanto. En la posta jaro, temis pri 37 gazetoj kaj 125 artikoloj, en 1978 la nombro de la gazetoj estis 45, kaj tiu de la artikoloj 215. Dum la jaro 1979 oni registris la aperon de 178 artikoloj en 49 gazetoj, kaj dum 1980 temis pri 47 gazetoj kaj 192 artikoloj. En la lasta jaro (kiel dirite), kiun traktas la superrigardo – 1981, aperis 286 artikoloj en 68 gazetoj kaj revuoj.

Estas aparte interese, ke tiu analizo (farita de B. kaj W. Pfennig) okupiĝis ankaŭ pri la demando, kio estis la ĉefaj temoj de tiuj 286 artikoloj en 1981. Ni ekscias, ke 167 artikoloj traktis la praktikan aplikon de Esperanto, 38 okupiĝis pri lingvistikaj trajtoj de la lingvo, 34 tekstoj temis pri la landa asocio en Germana DR (tiu Esperanto-organizaĵo en 1981 ŝanĝis sian organizan formon), 21 artikoloj rilatis al Esperanto kaj sociaj agadoj, dum la ceteraj tekstoj temis pri kongresoj kaj aliaj aranĝoj aŭ estis apartaj intervjuoj pri la Internacia Lingvo.

Tiu analizo pri la temoj de la aperintaj artikoloj liveras al ni gravan lecionon, validan supozeble ankaŭ ekster la limoj de Germana DR: kiam oni al la gazetaro proponas informojn pri la aplikado de Esperanto en la praktiko, tiam oni akceptas tiajn tekstojn multe pli volonte, ol kiam ni regurdas al ili tiun faman fabelon pri Bjalistoko kaj la eta Ludoviko konfuzita per la kvargenta lingva problemaro. Alia parto de la sama leciono estas, ke necesas havi viglan landan asocion, por ke en tiu lando la amaskomunikiloj interesiĝu pri Esperanto, necesas aktivigi por Esperanto, se oni sopiras nacilingvan informadon pri Esperanto. Ni notu fine ankaŭ la informon, ke en 1981 en Germana DR ne aperis gazetartikoloj, kiuj kontraŭis la Internacian Lingvon.

Kiel ni jam plurfoje ripetis dum la lastaj jaroj, okazas tuta revolucio en la rilato de la amaskomunikiloj al Esperanto. Ne nur en Germana DR sed ankaŭ en Japanio, FR Germanio, Britio, Irano, Brazilo, Hinda Unio, Kanado, Ĉinio, Jugoslavio, Usono ktp. Ĉio ĉi okazas malgraŭ la fakto, ke ĝuste dum tiuj lastaj jaroj la centrita gazetara informado (pere de UEA) serioze lamas. Eble tiu lamado havis pozitivan efikon, ĉar ĝi vekis iniciatemon de kompetentaj informantoj je la landa kaj loka niveloj.

sm

LINGVO

Oni ŝanĝu maŝinojn, ne la lingvon

Akademaj studoj 1983. Red. Rüdiger Eichholz (1922). Div. aŭtoroj. Bailieboro: Esperanto Press, 1983. 208p. 29cm. Mimeo. Prezo: 27,00 guldenoj.

Unue pri la nomo: *Akademaj studoj 1983* sugestas (kaj la antaŭparolo eĉ pli emfazas tion), ke temus pri eldonaĵo de la Akademio de Esperanto. Aŭ almenaŭ pri libro konsistanta el kontribuaĵoj de akademianoj. Sed ne estas tiel. Temas pri kolekto da represoj de diversloke aperintaj artikoloj kaj studoj pri kelkaj temoj, kiel fono por diskuto en la Akademio. Tiel almenaŭ mi interpretas la intencon de la redaktinto, kiu estas gvidanto de la Terminologia Centro de la Akademio kaj mem akademiano. La titolo sugestas ankaŭ ian akademian nivelon de la kontribuaĵoj. Kiom tio ĝustas por la diversaj eroj, ni ankoraŭ vidu.

Telekomunika/komputila alfabeto: Represiĝas artikoloj de Schnell el *Kontakto*, de Fischer kaj Watts el *Monato*, de Fischer el...? (fontoj kaj publikigodatoj ne estas sisteme indikitaj). Kiel konate, la tradicia telegrafa alfabeto ne havas supersignojn. Por ĝi validas: ĉ = ch aŭ, por maŝina uzo, ĉ = cx (la redaktoro retrovis la koncernan rekomendon el 1962). Tiu lasta ebligas simple restarigi la normalan skribon. Tion ne ebligas la sensupersigna alfabeto proponata de Fischer, kiu tute forigas ĉ kaj ĝ. Fischer asertas, ke ĝuste en Esperanto kiel planlingvo oni povas ŝanĝi la alfabeton por kontentigi la maŝinojn. Li forgesas, ke Esperanto ne estas projekto, kaj ke tia ŝanĝemo pro iutempaj "bezonoj" ne pliigas la seriozecon de la lingvo kaj ĝiaj uzantoj en la okuloj de eksteruloj. Cetere, la nova telekomunika alfabeto ja enhavas supersignojn. Schnell proponas utiligi ties lokojn por supersignitaj literoj, malfaciligante tiel la kontakton kun neadaptitaj aparatoj. Krome, li ne trovas lokon por ĥ. Aĥ! Ĝi tamen ne estas uzata... Watts montras kiel lia komputilo presas la supersignitajn literojn – tute bele en la kadro de la litertipo. Fischer tamen kritikis ĝiajn Ĉ kaj Ĝ, dum al mi ne plaĉas ĝiaj m kaj r. Kion fari? Tehnike limigita maŝino havas limigitajn eblecojn.

Ĝenerala impresio: Diversaj homoj spertas diversajn malfacilaĵojn en komputila traktado de Esperanto. Ĉiu serĉas solvon por sia problemoj kaj proponas adapti la lingvon (ne la maŝinon) al tio. Ĉu ne estus pli bone, tiel longe ke komputiloj ne estas bone normigitaj, akcepti taŭgan alfabeton por uzo **inter** la diversaj maŝinoj, kaj solvi la aliajn problemojn laŭ la marko kaj modelo de la aparato, sen atenci la lingvon pro tio?

Komputila traktado de Esperanta teksto: Atento-kapta esplorraporto de Sherwood, kiu per tio pruvas, ke estas pli bone trovi labormetodojn por trakti la lingvon, ol provi ŝanĝi la lingvon aŭ la ortografion eĉ antaŭ ol oni komencas labori. Sherwood sukcesis laŭtlegegi Esperanton maŝine, kun kontentigaj prononco kaj frazmelodio.

Seksa diskriminacio en la lingvo: Interesaj studoj de Bormann kaj Eichholz. Tipe por Eichholz, la solvo de lia edzino kaj li enhavas "inventon" de pluraj prefiksoj kaj sufiksoj por montri la indikon/neindikon de sekso, kiam oni parolas pri homoj. Tamen, bona superrigardo pri la multaj sugestoj faritaj pri ĉi tiu temo. Sed, solvo en Esperanto ne okazos, laŭ mi, pli frue, ol ĝi okazos tiuj centoj da aliaj lingvoj kun mil-jara tradicio, kiuj pli-malpli same "diskriminacias".

Ĥemia nomenklatur: Ekzemplo de funda, senemocia, nete scienca traktado de terminologia problemaro (acido-nomoj), fare de Portmann. Jen traktado de temo, kun konsidero de la internacie validaj normoj kaj kutimoj, kun respekto al la propraj ecoj de Esperanto, al la proponoj kaj al la efektiva uzado de aliaj. Jen ekzemplo el kiu lerni la manieron de ĝusta traktado de terminologia aŭ nomenklatura problemaro.

Komputilo/komputoro/komputatoro ktp.: Represo de la tuta (?) kverelo pri vortoj. Ekzemplo de tio, kiel oni **ne** traktu terminologian/nomenklaturan problemon. Kun neglekto de internaciaj normoj kaj kutimoj, kun neglekto de proponoj jam faritaj kaj uzado jam okazinta, kun manko de respekto, kun kalkuloj pri enketrezultoj laŭplaĉe ŝanĝitaj, eĉ... Certe interesa por psiĥologoj.

Lando- kaj popolo-nomoj: Studo de Albault, la specialisto pri lando-nomoj en la Akademio. Ĉar la rezultoj atingitaj foje tamen verdiktas pri la metodo aplikita, mi menciuj kelkajn rezultojn. Unue mi diru, ke la granda plimulto de la prezentitaj nomformoj estas tute normala. Sed: Pollando estu *Polonio*, ĉar *Polon-* estus "internacia" radiko. Tie la *Polonoj* parolas *Polonezon*. Liĥtenŝtejno nomiĝu *Listenŝtajno* (kialo ne-indikita). FR Germanio estu *West-Germanio*, kaj Germana DR estu *Eost-Germanio*. Krome, kie la franca kaj hispana lingvoj simple kopiis la anglan nomon, tie, laŭ Albault, Esperanto same havu *w* (*Malawio*, *Zimbabweo*, *Kuwaito* ktp). Se akademianoj havas tian sintenon al la lingvo, ĉu valoras havi la Akademion?

Matematikaj kaj statistikaj terminoj: Temas pri korektoj kaj aldonoj de Reiersøl al la matematikaj kaj statistikaj terminoj en *PIV*. Ĉar Reiersøl aperas en *PIV* kiel kunaŭtoro pri tiuj temoj, la teksto estas leginda por ĉiuj, kiuj emas alvoki la aŭtoritatecon de *PIV*. Montriĝas, ke ankaŭ *PIV* estas nur laboraĵo de homoj. Cetere, la traktaĵo de Reiersøl aperis fine de 1982 kiel aparta eldonaĵo.

Eraroj: Homoj pli spertaj pri diversaj fakoj trovas pli da malĝustaĵoj. Mi scias, ke la nederlanda ortografio, kontraŭe al diverslokaj asertoj en ĉi tiu libro, ja havas super- kaj sub-signitajn literojn kaj du "liberajn" supersignojn por indiki novan silabon aŭ vortakcenton. Ankaŭ Albault plurloke eraras pri la nederlanda. Kontraŭe al la aserto de la redaktinto, 7-bita literkodo ne okupas malpli da memorloko kaj sendotempo ol 8-bita literkodo, ĉar la "7-bita" estas ankaŭ 8-bita (kun aŭ sen kontrolbito).

Voĉdono: En la fino de la libro estas voĉdoniloj, sur kiuj la hazardaj ricevintoj kaj aĉetintoj povas voĉdoni pri diversaj proponoj, laŭ la kutimo de la Terminologia Centro. Pluraj demandoj, al kiuj oni povas respondi per jes aŭ ne, estas tre sugestaj, aŭ simple ne respondeblaj per jes aŭ ne. Cetere, oni ne povas voĉdoni pri tio, ĉu $2 + 2$ egalas al 3 aŭ 5. Eĉ ne, ĉu tio egalas al 4!

Resumo: Estas bona ideo kolekti artikolojn kaj studojn pri certa temo, kiel bazon por konsiderado de eventualaj problemoj kaj solvoj. Tia kolekto tamen estu (por ĉiu temo) pli kompleta, kun pli da faktomaterialo, kun dato- kaj fonto-indikoj, ol estas la kazo kun ĉi tiu libro. Ŝajnas al mi preferinde, limigi tiajn kolektojn al unu temaro aŭ fako, ĉar tiel ĉi la verko fariĝas tro dika kaj peza, kaj kosta pro la enesto de temoj pri kiuj la interesiĝanto tamen ne spertas. Ŝajnas al mi preferinde, ke oni ne kreu "problemojn" sen efektiva kaŭzo montriĝinta el publikigita esploro. Kaj se temas pri problemoj de maŝino kaj lingvo, oni solvu ilin kiel maŝino-problemojn, ne kiel lingvo-problemojn! Finfine, ankaŭ akademianoj pli ol ĝis nun konsciu, ke Esperanto **ekzistas** kaj ke ĝiaj **propraj** normoj kaj reguloj estas ĝia forto. Espereble, la libro instigos iujn al pli saĝa kaj pli sagaca studado de iuj el la traktendaj temoj. Kiel dirite, ĉi tiun libron enestas ankaŭ tre bonaj ekzemploj de traktado!

Wouter F. Pilger (Nederlando)

Esperanto en telefonlibroj

Mi eble povus fari sugeston: unu el niaj membroj rimarkigis al mi, ke li vane serĉis nomon de Esperanto-grupo, kiam li estis en brazila urbo. En Melburno ni uzas la telefonan numeron de la sekretario de Melburna Esperanto-Societo, kiu mem ne havas telefonon. Ni devis pagi pro la ekstra mencio, kiu en la telefonlibro aperas sub la nomo Esperanto Information Bureau (Informa Buroo pri Esperanto). Okaze ni ricevas utilajn petojn pere de tiu numero. Mi baldaŭ parolos pri Esperanto en klubo, kaj la invito venis pro tiu telefonlibra mencio. Antaŭ iom da jaroj mi faris serion da prelegoj pri Esperanto en gimnazio, denove dank' al tiu numero. Eble aliaj Esperanto-grupoj povus utiligi ĉi tiun sugeston.

K.G. Linton, Aŭstralio



Kongresa Komunikilo

**68a UNIVERSALA KONGRESO
DE ESPERANTO, Budapeŝto (Hungario)
1983 07 30 – 08 06**

**Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176,
3015 BJ Rotterdam, Nederlando.**

Adreso de LKK: Pf.193, H-1368 Budapest

Kongresa Programo: Dum sia aprila kunsido la Estraro de UEA aprobis la sekvan oficialan programon, kiun ni publikigas detale por helpi al kongresanoj frue plani sian kongresan semajnon.


Vendredo, 83 07 29 (nur laborkunsidoj): Antaŭtagmeze (ATM): Komisionoj pri: Elektoj, Statutoj de landaj asocioj. Posttagmeze (PTM): Komisionoj pri: Planado, Informado, Kongresoj, Kultura Agado, Eksteraj Rilatoj, Financo kaj Administrado, Landa Agado, Edukado, Elektoj, Jubilea Jaro, Ekzamenoj. La komitato de UEA kunsidos inter 10h00 kaj 12h00, kaj havos komunan vespermanĝon.

Sabato, 83 07 30: ATM: Komisionoj pri: CED, Kongresoj, Elektoj, Faka Agado. PTM: Komisionoj pri: Jubilea Jaro, Internacia Kongresa Universitato (IKU), Statutoj de landaj asocioj. La komitato kunsido

dos dum 2 horoj matene kaj 3 horoj posttagmeze. Estos tuttaga ekspresa kurso pri la hungara lingvo. Vespere okazos la Interkona Vespere, dum kiu estos distra kvizo (demandokurso) pri "Kion vi scias pri Hungario?".

Dimanĉo, 83 07 31: ATM: Solena Inaŭguro. PTM: Akcepto por Societo Zamenhof, Malfermo, Kvizo (La 75-jara historio de UEA), Inaŭguro de IKU kaj la 1-a prelego (Benczik), Ekumena Diservo, Fakkunvenoj: IUEF, IKEL (Jarkunveno), UALE, nepublika kunsido de la Akademio. Nacia Vespere.

Lundo, 83 08 01: ATM: Komitato de UEA, TEJO sin prezentas, IKU 2 (Frank), IKU 3 (So), publika kunsido pri Turismo. Fakkunvenoj: EGLI, ILERA. Regulaj eroj (kiuj okazos samhore ankaŭ en mardo, ĵaŭdo kaj vendredo): Progresiga Kurso, Cseh-Kurso (por komencantoj) 1, Konversaciaj Rondoj, fakkunsidoj pri la kongresa temo. Cetere, la tem-kunsidoj ĉiam daŭros tuttage se necese. PTM: Unua Ĝenerala Kunsido (kun la Komitato de UEA), Asembleo de Fakaj Asocioj, Parlamenta Agado. Fakkunvenoj: IKUE, IFEF, TEVA, INOE, MEM, KELI, IPTEA, ILEF. Komisionoj pri: Rezolucioj, Edukado, Informado. Regulaj eroj (kiuj okazos samhore ankaŭ en mardo, ĵaŭdo kaj vendredo): Cseh-Kurso (por komencantoj) 2, Cseh-Seminario, 2 teatraĵoj (unu je la 16h00, alia je la 19h00). "Budapeŝtanoj renkontas vin" (amasrenkontiĝo en parko). Muzika Vespere.



Budapeŝto atendas plurajn milojn da esperantistoj dum la 68a UK, kiu certe fariĝos unu el la plej multnombraj en la tuta historio de la Movado.

Mardo, 83 08 02: ATM: Komitato de UEA, IKU 4 (Hauger), IKU 5 (Plehn), IKU 6 (Marinov). Fakkunvenoj: MT, ORE. (Vidu ankaŭ lunde por ripetotaj eroj). PTM: Plenkunsido pri la kongresa temo, Delegita Reto. Fakkunvenoj: IKEL (publika), LIBE, ISAE. Komisionoj pri: Statutoj de Landaj Asocioj, Virina Agado, Eksteraj Rilatoj, Informado, Junulara Jaro, Rezolucioj. (Vidu ankaŭ sub lundo por ripetotaj eroj). Krome okazos teatra prezento en la kongresejo (la du aliaj estos en aparta teatro).

Merkredo, 83 08 03: ATM: Internaciaj Ekzamenoj. Vespere: Teatraĵo, Junulara Vespere. Estraro kaj PEA. Krome, okazos tuttagaj ekskursoj.

Ĵaŭdo, 83 08 04: ATM: Plenkunsido pri la kongresa temo, Junulara Debato, Virina Agado, Esperantologia konferenco, Akademio (publika), Tago de la Lernejo. Fakkunvenoj: ELF/AREK, BEL, IEKA. Respondeculoj de landaj asocioj. (Vidu ankaŭ sub lundo). PTM: Dua Ĝenerala Kunsido, Tago de la Lernejo, Esperantologia Konferenco, Sporta Agado, Regiona Agado, Agado ĉe UN. Fakkunvenoj: EEU, VEK, MEL. (Vidu ankaŭ sub lundo). Vespere estos plia teatraĵo en la kongresejo.

Vendredo, 83 08 05: ATM: Komitato de UEA, IKU 7 (Eichhorn), IKU 8 (Mészáros), Estontaj UK-oj sin prezentas, Respondeculoj pri landa agado, CED (publika), Institucio Hodler. Turisma Foiro. Komisiono pri Rezolucioj. (Vidu ankaŭ sub lundo). PTM: La nova Estraro sin prezentas, Belartaj Konkursoj, kongresaj perantoj (nepublika). Fakkunvenoj: UMEA, ILASE, IAdEM (publika), IAdEM (Jarkunveno). Vespere: Bankedo kaj Balo. (Vidu ankaŭ sub lundo).

Sabato: 83 08 06: ATM: Komitato de UEA. Solena Fermo. PTM: Nepublikaj kunsidoj: Estraro kaj TEJO, Estraro kaj ĈEL, Estraro kaj LKK de la 69a UK en Vankuvero.

Inaŭguro kaj Malfermo: Por ebligi, ke lokaj esperantistoj, kiuj ne povas aŭ ne volas partopreni la tutan Kongreson, povu ĉeesti la unuan plenan tagon de la Kongreso, la Estraro decidis permesi, ke oni ĉeestu la Inaŭguron kaj Malfermon kontraŭ nur 100 forintoj (la kutima unutaga karto kostos 500 forintojn). La gastparolanto dum la Solena Inaŭguro estos s-ro Richard E. Butler, ĝenerala sekretario de Internacia Telekomunika Unio kaj ĉefkunordiganto de la Monda Komunika Jaro.

Muziko: La ĉi-jara Muzika Vespere havos iom specialan karakteron: la unua duono konsistos el Korusa Konkurso, ĉar estas tiom da entuziasmo inter esperantistoj pri ĥora kantado. Tio kaj la dua duono de la vespero kun la Simfonia Orkestro de la Fervojistoj (aparte renoma hungara ensemblo), espereble allogos ankaŭ la ĝeneralan publikon, kies atenton oni provos kapti dum la pli frua parka renkontiĝo (vidu la programon por lundo).

En majstra parola Esperanto

Ĉu ni kunvenis vane?, de Johán Valano (pseŭd. 1931). Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto, 1982. 180p. 21cm. ISBN 90 6336 023 1. Prezo: 25,80 gld.

Ĉu vi konas Valanon? Do vi scias, kio atendas vin: daŭrigo de lia ĉu-serio. Plia krimromano. Tamen ĉi-foje plurajn gradojn pli bona ol la antaŭaj. La historio estas ankoraŭ pli kohera kaj per tio pli atentokapta kaj cerbumiga.

Detektivo Karal vojaĝas al Alma-Ato, kie okazas internacia konferenco, en kies kadro renkontiĝas ĉiaj malsamlandanoj kun malunuecaj intereso. Iuj kunsidas, aliaj defraŭdas, iuj ekskursas, pliaj spionas, iuj intrigas, kaj — unu murdas; tio lasta kompreneble okazas en la aparte gardata gravulkoridoro. La enketadon post la murdo komplikas la komuna malkunlaboro de internaciaj kaj sovetaj detektivoj, interplekto kun internacinivela finantrompo kaj amatora spionkomploto. Gravajn kromrolojn ludas ankaŭ cirka klaŭno, jida ĵurnalo kaj neekzistanta observkamerao.

La enscenigo de la romano en la ĉefurbo de soveta Kazaĥujo, de kiu la leganto ricevas turistan rapidimprezon, aldonas spicon de realeco, kiu estas plia pozitiva poento de la verko.

Estas vera ĝuo frandi la lingvaĵon de Valano. Li ja tie kaj jene forlasas la vortarajn kaj gramatikajn normojn, sed li verkas tiel lerte, elegante, precize, unuvorte: tiel vive, ke oni ne povas dubi, ke Valano estas majstro de verkado en parola Esperanto. Kaj ĝuste pri la parola stilo la Internacia Lingvo havas malmultajn majstrojn.

Klaus Schubert (FR Germanio)

Perloj de la ĉeĥa beletro

Intima triptiko (elektitaj tradukaĵoj), de diversaj ĉeĥaj aŭtoroj. Tradukis Rudolf Hromada (1890-1964). Prago: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 1978. 72p. Ilus. 19cm. Prezo: 4,50 gld.

Bona traduko de bona poemo impresas min kvaŭ bela virino: ŝi povas ŝanĝi la vestojn, sed nenion perdas de sia beleco, kelkfoje eĉ gajnas, kondiĉe ke la tajloro bone tranĉis. Kaj Hromada vere sciis fasoni Esperantajn kostumojn por tiuj perloj de la ĉeĥa beletro. Per tio li faris netakseblan servon al sia kulturo, ĉar, esprimante sin per unu el la "minoraj lingvoj", ties sola ŝanco por tiel mondskala disvastigo troviĝas en la perado fare de la Internacia Lingvo. Vere

tiu atingeblo esprimita en absolutaj nombroj ne atingas la ordon de la milionoj, tamen la trafitoj reprezentas la eliton, tiun parton de la homaro interesitan ne nur pri kulturo ĝenerale, sed ankaŭ pri fremdaj kulturoj speciale.

La unua parto de la libro prezentas elekton el la ĉeĥa poezio, dividitan en tri sekciojn. Sep poemoj de kvar poetoj priskribas la naturon, per freŝaj, viglaj koloroj. Dek kvin poemoj de dek unu aŭtoroj verkantaj pri amo pritraktas tiun jam pli kompleksan temon el diversaj anguloj. Ĉefe impresis min ĉi tie "Donu la manon" de Heyduk, pro sia Filemon-Baŭcisa kunsignifo; "Nur unufoje" de Bezruč, kiel konfirmo de nia aprezo pri la feliĉo nur kiam ĝi jam pasis; de Olga Scheinpflugová la poemo pri la tre malfacila arto "Scii disiri". En la sekcio "Vivo" troviĝas dek unu pecoj de dek poetoj, kelkaj reprezentitaj ankaŭ en la aliaj partoj. En ĝi ja ne povus manki, kiel en la realo post la vivo, "Morto" de Šrámek, kiun tute nature sekvas la sola prozaĵo, du ĉapitroj el "Raporto skribita sur la pendumila maŝo" de Julius Fučík, impresanta ĉefe pro tio, ke la aŭtoro fakte suferis ekzekuton fare de la nazioj.

Se vi, leganto, apartenas al tiu malgranda elito supre menciita, nepre aldonu ĉi tiun modestaspektan, tamen riĉenhavan, broŝuron al via biblioteko.

Leopoldo H. Knoedt (Brazilo)

Rajto, kiun oni devas perlabori

Japaneskoj, de Edwin de Kock (1930). Pyramid (Sud-Afriko): La aŭtoro, 1982. 114p. 19cm. Prezo: 13,20 gld.

Nia literaturo iras diversajn novajn vojojn. Ne nur junaj verkistoj okazigas tion ĉi. De Kock estas konata bastiono de la postmilita literaturo, kiu, per la poemoj kolektitaj en ĉi tiu libro, tre malbastione – mal-"kolone" – pioniras ion samtempe aventuran kaj disciplinan. Nome, li enprofundiĝas en la verkadon de hajkoj, tankaoj kaj longutaoj. Por li, persono trem-pita en la okcidenta kristana kulturo (kiel la poemoj montras), temas pri granda salto.

Oni apriorie povus timi, ke li nur belete ekzotikumu per foja frando de fremda metriko; aŭ ke, male, li provus tro seriozmiene fabrikii konscian ponton per tio, kion Arthur Miller post vojaĝo al Ĉinio nomis "emocia kriado" – troiga esprimo de siaj sentoj por ke "eĉ barbara fremdulo" komprenu la sentojn. Tiajn timojn jam forpelas la antaŭparolo de la ne facilanime laŭdema kritikanto Tazuo Nakamura, kiu post zorga analizo konkludas, ke De Kock "estas la unua ne-japana utaisto unuaranga en Esperantujo".

Poste la leganton kaptas serio da briloj – la precizaj paĝoj varias laŭ la leganto; por mi temis pri 6, 11,

28, 31, 39, 44, 50, 51, 71, 79, 83, 84, 86, 89. Oni ne permesos, ke mi citu ĉion ĉi, sed mi rajtu citi almenaŭ: *Nun dormovoje / la blankaj sonĝanasoj / senmanke, ĝoje, / preter ĉaso kaj ĉano, / tra menso de infano.* (79) Kaj lia "Por Albert Goodheir" (75), *Same supoza / la religi Spinoza. / Tamen aŭtune / per vi ĝi ne kontuzas; / lotusbasen ripoza, ŝajnas al mi esprimi la ĝustan tonon. Tamen aŭtune / per vi ĝi ne kontuzas.* Eĉ ne en lokoj, kie vi eventuale tuŝas iun vian opinion, kiun leganto eventuale malŝatas kiel opinion.

Atingi tian kvieton ne estas facilaĵo. Ne organizu seminarion pri ia universala rajto verki utaojn. Tian rajton oni devas perlabori. Temas ne pri metrika truko, sed pri aliigo de la personeco. La defio ne estas simpla, kaj ne estas por ĉiuj, eĉ ne por ĉiu strebanta homo. Nur se vi efektive apartenas al la kvieto.

Probal Daŝgupto (Hinda Unio)

Klasikaĵo pri Donjuano

Don Juan' Tenorio, de José Zorrilla (1817-1893). El la hispana trad. Luiso Mimó Espinalt. Ascoli Piceno: Gabrielli, 1981. 188p. 20cm. Plejado: Beletra Eldon-serio 12. Prezo: 24,00 gld.

Ekde la 16a jarcento, multaj verkistoj sentis sin instigitaj priskribi la vivon de la legenda virindeligisto Donjuano. La plimulto el tiaj verkoj baziĝas sur la dramo de Tirso de Molina, hispana monaĥo, kiu unuafoje prezentis la donjuanman personecon, ĉerpante el tradiciaj popolaj legendoj. La plej konataj samtemaj verkoj estas, krom la opero de Mozarto, la komedio de Molière (tradukita al Esperanto de E. Boirac) kaj la satira eposo de Bajron, kies unuan kanton brile tradukis William Auld. Ambaŭ verkoj jam sufiĉe diferencas de la moraleca teatraĵo de la hispana monaĥo.

Pli simila al la origina teatraĵo estas la "versa dramo religia-fantasta" *Don Juan' Tenorio* de José Zorrilla, nun havebla en Esperanto. Ĝi estas verŝajne la plej populara interpreto de ĉi tiu legendo en Hispanio. Tion pravas la tradicio spektigi ĝin ĉiujare dum la festo de ĉiuj animoj. La plej okulfrapa diferenco inter la verko de Tirso de Molina kaj tiu de Zorrilla estas, ke la romantika kaj multe pli homeca heroo de la lasta ne estas damnita, sed savita per la amo de Donna Agnesa, unu el liaj viktimoj.

Bedaŭrinde, la tradukinto, Luiso Mimó Espinalt, kiu ĝenerale klopodas tre precize traduki, rezignas entute pri rimoj, tiel ke la traduko eĉ ne provas redoni la plenan elvokivecon de la diversaj rimaj kaj ritmaj sistemoj, laŭsituacie aplikitaj de la aŭtoro.

La tradukinto pretendas, ke li tradukis la dramon al "regula pure Zamenhofa Esperanto (Analiza skolo)". Sed ŝajne lia "Zamenhofa" lingvouzo ne dis-

ponas pri netransitivaj verboj (kp. p. 35: "Tekstis ĉi tion:"; p. 43: "Meditu, don Juan', l' entreprenon" aŭ p. 136: "loĝis ĉi palacon"). Tial, li verŝajne apenaŭ bezonas la sufikson -ig- (kp. p. 41: "Mi... sumas..." aŭ p. 148: "Tiu ĉi tomba marmoro torporas mian viglecon"). Kompense, li ofte uzas predikativan konstruon. Precipe kun la verbo **havi**, tio tamen ŝajnas evitinda (kp. p. 34: "Kaj ĉar kontraŭa la opinion vi havis,...", aŭ p. 120: "ke la kuraĝon pruvita vi havas"). Same, mi ne uzus la difinan artikolon kune kun posesivaj pronomoj ("al li l' menso kaj koro miaj impetas", p. 85).

Eble pli "Zamenhofa" estas la konfuzo pri la esperantigo de propraj nomoj, ĉar jen ĝi okazas laŭ la ortografia formo (*don Juan'*), jen laŭ la fonetika (*Meñia*), jen laŭ la etima (*donna Agnesa el doña Inés*). Kelkaj nomoj estas neŝanĝitaj (*Christófono Buttarelli*, ekde p. 27 tamen *Kristoforo Buttarelli*).

Tiu ĉi problemo apenaŭ rimarkiĝas, kiam spektantoj aŭdas la tekston, sed ĉu ili povas kompreni frazon kiel ekzemple jenan:

*La figur' de ĉi tombo nin invitis
pli certan pruvon, por ke ne hezitu
mi plu, nun veni serĉi, ĉar malfidis
mi. ... (p. 179)?*

Alia problemo de sceneja prezento estas, ke formoj kiel *obstakl'* estas apenaŭ prononceblaj.

Tamen, sur la scenejo ĉi tiu traduko estos tre vigla, kvankam ĝi estas rekomendinda precipe kiel legaĵo al tiu, kiu volas familiariĝi kun la personeco de Donjuano, alegorio de eŭropaj (mal)moralo kaj idealoj.

Martin Haase (FR Germanio)

Ne timu fortostreĉon!

La ŝtona testamento / Kiven testamentti, de Reino Eriksson (1940). Kuopio: Kustannuskiila Oy, 1981. 112p. 21cm. Poemaro en la finna kaj Esperanto. Prezo: 34,20 gld.

Kiam mi aŭskultas muzikon, nenion mi komprenas; tamen mi kapablas plene ĝui ĉiujn naŭ simfoniojn de Betoveno, kvankam oni tiujn certe klasigas inter la malfacilajn komponaĵojn. Ankaŭ pentraĵojn mi aprezas, eĉ kiam ili ne bildigas ion koheran kaj konatan. Sufiĉas, ke ili formu iun harmonian tuton. Tamen, kiam temas pri literaturo, mi serĉas ne nur sonan harmonion, sed volas ankaŭ penetri en ĝian plenan sencon. Kaj tio ne ŝajnas facila en la poezio de Reino Eriksson.

Jen la unua poemo "Naskiĝo": *Mi kunportis ĉi tiujn du ledplatojn / el la kova malseko de Utro-groto / por demandi klarigojn pri la signoj sur ili / en taglumo / al mi mem kaj aliaj. Mi disvolvis malrapide la malsekajn pergamenojn / de miaj manoj, / la mapojn en la komenco desegnitajn / al malkovristoj. / Mi etendis miajn manojn / kaj alĝustigis iliajn unikajn*

La Katalogo de la Libroservo de UEA ne aperos, bedaŭrinde antaŭ la fino de aŭgusto aŭ komenco de septembro ĉi-jare. Ni pardonpetas al la klientoj.

sulkojn / al la aliaj sulkoj. Nu, la unuopaj sonoj, la frazoj ja ŝajnas klaraj, tamen la senco kaŝita postulas mediton kaj allasas certe pli ol unu interpreton, double malfacilan por tropiklandano pro aludoj al ekskluzive finnaj aferoj, kiel ĉi tie Utro-groto, kiun, se ne simbolo de la patrina utero, sed reale ekzistanta, eble ĉirkaŭŝvebas iu tiea legendo.

Se oni taskus al mi analizi la poemon "Naskiĝo" mi riskus diri, ke la manaj sulkoj entenas la tutan homan destinion, kiun antaŭgravuris la tradicioj venintaj tra miloj da generacioj, kaj la glatan socian kunvivadon difinas la alĝustigo de ĉies individua tradicigraveda konduto al tiu de liaj aŭ ŝiaj kunhomoj. Probable, la poeto mem intencis diri ion tute alian, kaj ankaŭ ĉiu leganto, se tiu serĉos iom profunde, alvenos al ankoraŭ tute malsamaj konkludoj. Jen kia estas la poezio de Eriksson: invito al sondado. Eĉ la titoloj de la poemoj kaj de la sekcioj, en kiujn la libro dividiĝas, ne multe helpas tiucele, ĉar sub la surfaca priskribo de plej ofte aferoj de la naturo, sin kaŝas io pli profunda. Kiu ne timas mensan fortostreĉon, nepre akiru la verkon. Kelkaj ilustraĵoj estus helpintaj plenigi la sufiĉe multajn blankajn spacojn de la cetere neriproĉeble bone presita libro.

Postnoto: Ĉi tiu estas jam la dua dulingva eldonaĵo, kiun mi legas ĉi-jare, krom unu liliputa eĉ trilingva. Miaopinio tio estas tre grava detalo pro diversaj kialoj: unue, ĝi faciligas la publikigon, ĉar eblas ampleksigi la eldonkvanton pro la nombro da naciolingvaj legontoj; due, pri la aperigo mem povas interesiĝi iu ajn enlanda eldonejo; trie, la nacilingva leganto kontaktiĝos kun kaj pro tio eble ekinteresiĝos pri Esperanto. Tiucele konvenus ĉiam aldoni kelkajn informojn pri Esperanto, laŭ tiuj, kiuj aperis en la alia dulingvaĵo *Strangled Cries* (kial forfalis la Esperanta titolo?) de Balbin.

Leopoldo H. Knoedt (Brazilo)

La Libroservo de UEA

disponas pri kelkdeko da ekzempleroj de la baza bibliotekista manlibro

KLASIFO DE ESPERANTAJ TEMOJ

de M.C. Butler

La 144-paĝa verko aperis en 1950 kaj delonge ne plu estis akirebla en la merkato.

Prezo: 30,00 (por Nederlando 31,20) gld., plus sendokostoj. Mendu ĉe la Libroservo de UEA.

Tiel varbas legantoj de MONATO por MONATO:

Malriĉuloj! Estas pli bone esti sen mono, ol sen MONATO — ĝi riĉigos vian vivon!

Diccon Masterman

MONATO estas la alternativa revuo, ĉiuaspekte. 40 paĝoj, riĉe ilustrita.

Konvinkiĝu mem, petante provekzempleron ĉe la eldonejo: TK/STAFETO, Miksebaan 65A, B-2130 Brasschaat, Belgio, kontraŭ du internaciaj respondkuponoj (sed vi povas fari tiun peton nur unufoje!).



Profunda optimismo

Gardu la pacon!, de Asen Grigorov (1903). Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1980. 119p. ISBN 963 571 067 4. Prezo: 10,80 gld.

En sia postparolo, Venelin Mitev tiel bone analizas la aŭtoron – poeto, tradukisto, pedagogo, ĵurnalist –, ke estus pli bone tion komplete transskribi anstataŭ devi ripeti, kion jam diris Mitev. Sed tio ja alskribiĝus al mallaboremo de la recenzanto.

Se konsenti, ke lian tutan originalan verkaron trablovias iu elano, iu entuziasmo fontanta elinterne kaj strebanta al liaj noblaj idealoj, evidentas, ke la aserto disvastigita en la Okcidento pri nevalideco de engaĝita arto ŝajnas senfundamenta, almenaŭ kiam – kiel ĉi-kaze – ĝin inspiras tiel profunde enradikiĝintaj konvinkoj. Bedaŭrinde neniue el la du grandaj idealoj de Grigorov – socialismo kaj esperantismo – solaj kapablas gardi la pacon inter la homoj. Ankoraŭ mankas io. Pli bone skribi tiun ion per majuskloj: IO.

La dua parto de la libro enhavas tradukojn el la bulgara poezio, klasika kaj nuntempa. Ĝi bone reflektas la luktojn de tiu popolo, unue kontraŭ la turkoj – alireligiaj, alilingvaj, alikulturaj –, poste kontraŭ la propra kaj ankoraŭ pli poste kontraŭ fremdaj faŝismaj reĝimoj. Eĉ kiam ŝajne naivaj, kiel ĉe "Florvendistino" de Smirnenski, ili ĉiam alportas iun protestan mesaĝon, ĉi tie kamuflitan sub la akuzo kontraŭ maskla libido. Eble pro tio Grigorov tradukis (aŭ eble la redaktoro elektis poemojn de li tradukitajn) enhavantajn lian optimismon kaj neŝanceleblan fidon je pli bonaj tagoj por la homaro, kiel ekzemple "Kredo" de Vapcarov: *Eble vi volas / ĝin neniigi, / ĝin – mian kredon / pri tagoj feliĉaj, / ĝin – mian kredon, / ke morgaŭ fariĝos / la vivo pli bela, / la vivo pli saĝa.*

Kaj la originala verkaro kaj la tradukaĵoj de Grigorov jam sufiĉe konatiĝis en Esperantujo, tamen pro ilia diseco en diversaj revuoj ili ne estas facile alireblaj, kion ili meritas. Espereble ĉi tiun modestan specimenan broŝuron baldaŭ sekvos lia "Kompleta verkaro".

Leopoldo H. Knoedt (Brazilo)

Laste aperis...

Esperanto: Metodo 11. Paris: Union Française pour l'Espéranto, 1982 (2a eldono). 76p. Ilus. 21cm. 11-leciona lernolibro pro komencantoj, uzanta nur 500 radikojn: kun ekzercoj kaj ambaŭdirektaj vortaretoj. Prezo: 12,00 gld.

Esperanto: Metodo 12. Paris: Union Française pour l'Espéranto, 1982. 80p. Ilus. 21cm. 12-leciona lernolibro por progresantoj. Prezo: 12,00 gld.

Esperanto por vi 1, Edward Malewicz. Warszawa: PZE, 1981. 18+144p. Ilus. 20cm. Mimeo. Baza lernolibro kun ekzercoj, legaĵoj, vortareto ktp. Prezo: 7,50 gld.

Esperanto por vi 2, Edward Malewicz. Warszawa, PZE, 1981. 200p. Ilus. 20cm. Mimeo. Daŭriga lernolibro por progresantoj. Kun ekzercoj, legaĵoj, vortareto ktp. Prezo: 7,50 gld.

Esperanto por vi 1, 2; Ksiaĝka nauczyciela, Edward Malewicz. Warszawa: PZE, 1981. 224p. Ilus. 20cm. Mimeo. Gvidlibro por la instruistoj laŭ la lerniloj *Esperanto por vi* de la sama aŭtoro. Prezo: 7,50 gld.

Fair bilingualism for Canada, A, V.S. Eichholz. Bailieboro: Esperanto Press, 1982. 30p. 21cm. Kun Esperanta resumo. Prezo: 2,40 gld.

Iglesia y el problema de la lengua auxiliar internacional, La, Jerzy Korytkowski. En la hispanan trad. E. Zanni. Barcelona: Editorial Claret, 1980. 142p. 23cm. Prezo: 15,00 gld.

Islamismo, La, A. da Silva. El la portugala trad. M. de Freitas. Porto: Portugala Eldona Rondo, 1982. 21p. 21cm. Mimeo. Prezo: 1,20 gld.

Katalogo de mia biblioteko (Stato: majo 1968), Reinhard Haupenthal. Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1983 (represo). 65+41+2p. 21cm. Mimeo. Prezo: 12,00 gld.

Matematiko translimen, n-ro 6. Red. I. Koutny. Budapest: IAdEM, 1983. 51p. Ilus. 21cm. Sciencaj kaj didaktitaj artikoloj de sep aŭtoroj. Prezo: 7,80 guldenoj.

Metamorphosen – Die Infra-Realität unserer Zeit (Metamorfozoj – La infrealo de nia epoko), Michel C. Jullian. Baden-Baden: Verlag Dr. Klaus Piepenstock, 1982. 196p. Ilus. 30×31cm. ISBN 3 921633 00 1. Kvarlingva eldono (germana, franca, angla, Esperanto). Pli ol 40 tutpaĝaj reproduktaĵoj de la verkoj de tiu surealisma pentristo. Prezo: 66,00 gld.

Metodo 11, Metodo 12: Kiel plej efike uzi ilin. Paris: UFE, 1982. 35p. 21cm. Prezo: 6,90 gld.

Proponaro de geometria terminaro gimnaznivela, Gerard Cool. La Chaux-de-Fonds: Kultura Centro Esperantista, 1982. 75p. 22cm. Mimeo. Prezo: 12,00 gld.

Psychological resistance to the international language, The, C. Piron. Bailieboro: Esperanto Press, 1982. 12p. 21cm. Prezo: 0,90 gld.

Resumo de la teorio de Antido (1907), René de Saussure (1872-1943). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1982. 53p. 24cm. Ĝi rilatas la unuan el pluraj lingvoprojektoj de la sama aŭtoro kaj interese prilumas plurajn trajtojn de Esperanto. Prezo: 12,00 gld.

Reveno. Div. aŭtoroj. El la vjetnama trad. Minh Kinh. Hanojo: Fremdlingva Eldonejo, 1981. 80p. 16cm. Tri mallongaj rakontoj. Prezo: 3,00 guldenoj.

Revizoro, La (1836), N.V. Gogolj (1809-1852). El la rusa trad. L.L. Zamenhof. Beijing: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1982. 123p. 19cm. Kun kelkpaĝa notaro por la ĉinaj legantoj. Prezo: 6,60 gld.

San Diego vokas, Alberta Casey. El la Cajon: Berta Records, 1981. Stereofonia kaseto. FM 81021. 13 famaj diversnaciaj kantoj, de diversaj aŭtoroj kaj tradukintoj. Akompanas instrumenta kvaropo. Prezo: 29,70 gld.

La rubrikon prizorgas: P. Hopkins, Room 108, Minota Hagey Residence, University of Waterloo, Waterloo, Ontario, Kanado N2L 3G1.

Ĉu nova ponto?

La seminario por grupgvidantoj, kunorganizita de TEJO kaj PSEK (Pola Studenta Esperanto-Komitato), okazis de la 4a ĝis la 9a de aprilo, en Pomiechówek, apud Varsovio. Malgraŭ la lastmomenta anoncado, ĝi estis sufiĉe internacia: el ĉ. 40 partoprenintoj, pli ol dek estis eksterlandanoj, el ses landoj. La seminario estis planita jam dum la TEJO-kongreso en Meksikio en 1981, en la kadro de kontrakto inter TEJO kaj PSEK: TEJO invitu ĉiujare du reprezentantojn de PSEK al la IJK, kaj rekompence PSEK gastigos saman nombron da TEJO-representantoj en internaciaj aranĝoj de PSEK en Pollando.

Dum tiu seminario, kaj poste, mi diskutis kun pluraj polaj esperantistoj iliajn malfacilaĵojn viziti okcidentan kongreson. Kelkaj el ili neniam povas veni, ĉar la kosto de la necesaj devizoj – en la nigra merkato – estas ilia plurmonata salajro. Tiel eblas pli bone kompreni la signifon de la termino "ne-transpagipova" kaj la utilon de la menciita kontrakto inter PSEK kaj TEJO.

La problemoj estas pli-malpli sama en ĉiuj orienteŭropaj landoj. Ĉu ne eblas havi pli ĝeneralan solvon? Kontrakto pri sendeviza interŝanĝo, simila al tiu kun PSEK – sed inter TEJO kaj ĉiuj ĝiaj landaj sekcioj en orienta Eŭropo – povus signife faciligi la kontakton de gejunuloj el tiuj landoj kun la tutmonda Esperanto-movado.

La jara konsultiĝo de la Esperanto-organizaĵoj de orienteŭropaj landoj, kiu okazis apud Varsovio du semajnojn post la TEJO/PSEK-seminario, estis bona okazo por renkonti ĉiujn gvidantojn de la landaj sekcioj de TEJO en tiu mondparto kune. Dum tuta posttagmezo ni diskutis, kaj rezultis propono pri kontrakto. La reagoj estis entuziasmaj. Iu asertis ke tiu kontrakto povus fariĝi la plej signifa paŝo kiun TEJO iam faris por siaj orienteŭropaj landaj sekcioj. Al la

propono aliĝis ĉiuj ĉeestantoj, reprezentantaj la junularajn Esperanto-organizaĵojn en Bulgario, Ĉeĥio, Germana DR, Hungario, Pollando kaj Slovakio, kaj la komisionon pri junularaj aferoj de Asocio de Sovietiaj Esperantistoj.

Unu semajnon poste, la estraro de TEJO, kunsidante en Strasburgo (Francio), diskutis la proponon kaj decidis plutrakti la detalojn, kun la intenco, ke ĝis la IJK en Debrecen, fine de julio ĉi-jare, la propono estu matura flanke de TEJO. Se la kontrakto efektiviĝos, eble jam en la IJK en 1984 (Swanwick, Britio) TEJO povos inaŭguri novan ponton inter Oriento kaj Okcidento.

Amri Wandel

Novaj aktoraj talentoj

Internacia Junulara Festivalo (IJF) fariĝas tradicia aranĝo de Itala Esperanto-Junularo. La 8a IJF okazis de la 30a de marto ĝis la 4a de aprilo en Domaso, ĉe la lagobordo de Como, kun cento da partoprenantoj.

IJF ŝajne provas sisteme debutigi teatrajn trupojn en la internacia Esperanto-medio. Antaŭ du jaroj, la festivalanoj povis konvinkiĝi pri la talento de la rumana trupo "Thespis"; ĉi-jare debutis la hungara trupo "Gorgo" el Budapeŝto.

Ĝiaj dudek anoj spektigis tri tute diversĝenrajn teatraĵojn, tradukitajn al Esperanto: *Naskiĝo de relikvo* de M. Salernitano, *La granda detektivo* de E. Leacock kaj *La ovo* de D. Buzzati. La ludado, reĝisorita de Margit Lököš, estis tre vigla kaj pruvis, ke la junaj geaktoroj posedas nekutiman talenton. Tiel efektan aktoradon oni spektis malofte – kaj certe ne dum la lasta Universala Kongreso. Aliflanke (kaj bedaŭrinde), la plimulto de la rolantoj neniel regis Esperanton, tiel ke la deklamado de la parkerigita teksto estis kelkfoje apenaŭ komprenebla.

Nu, en Debrecen, dum la Internacia Junulara Kongreso, ni eble revidos la trupon. Espereble, ĝia lingvokapablo tiam samnivelos ĝian bonan aktoradon.

M. Haase

Ekde 1983 *Kontakto* estas nova revuo, por homoj junaj en la vivo kaj novaj en la Movado. Novaj kaj modernaj temoj per facila, klara lingvo. Pli ofte, pli da paĝoj — sed la prezo sama!

Petu provekzempleron de la CO.

WILLIAM CLARKE (1895-1982), antaŭa delegito de UEA en Dunfermline (Skotlando), forpasis antaŭ nelonge. Li lernis Esperanton en 1939, multe instruis ĝin kaj, interalie, redaktis la unuajn sep numerojn de la periodaĵo *Esperanto en Skotlando*.

MAURICE EDWARDS, lernejestro en Maidenhead (Britio), forpasis la 16an de decembro 1982. Dum deko da jaroj Esperanto estis instruata en lia lernejo al centoj da infanoj.

JOSEF DRLIK (1909-1983), iama prezidanto de la Esperantista Klubo en Prago, funkciulo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj fakdelegito de UEA, mortis la 11an de aprilo.

THORSTEN FARM (1904-1983), UEA-delegito en Sundsvall (Svedio), mortis la 3an de aprilo.

ADOLF HALBEDL (1893-1983) forpasis la 19an de marto en Knittelfeld (Aŭstrio). Esperantisto ekde 1909, Halbedl estis unu el la plej eminentaj agantoj en sia lando, kie li pro la Esperanta laboro ricevis plurajn ŝtatajn distingojn. Li multe kunlaboris en diversaj movadaj periodaĵoj, estris ŝtatan ekzamenkomisionon pri Esperanto kaj okupis plurajn gvidajn funkciojn en la aŭstra Esperanto-movado. Li estis multjara membro kaj delegito de UEA.

A.M. SWART-VAN MOURIK (1911-1983) forpasis la 24an de aprilo en Eindhoven (Nederlando).

HANS WIEGAND (1903-1983), delegito de UEA en Freiburg (FR Germanio), forpasis la 9an de marto ĉi-jare.

HENRIKO VEENSTRA (1893-1983) forpasis en Oosterbeek (Nederlando) la 25an de marto. Li ellernis Esperanton antaŭ kelkaj jardekoj kaj kvankam en alta aĝo, li fariĝis unu el ĝiaj plej fervoraj propagandistoj en Amsterdamo kaj Roterdamo, kie li plej longe loĝis. Veenstra ofte kaj multe subtenis UEA ankaŭ finance kaj li estis unu el ĝiaj plej signifaj mecenatoj en la pasintaj dek jaroj.


OLE HAGEMANN (1950-1983), juna dana komputisto, kiu dum la lastaj du jaroj laboris en la CO de UEA en Roterdamo, forpasis la 4an de marto.

EDWARD DOMBSKI (1908-1983), multjara membro kaj fakdelegito en Stargrad (Pollando), mortis la 21an de januaro.

ZVONIMIR RADOŠEVIĆ (1908-1982), malnova esperantisto kaj multjara membro de UEA, forpasis en Zagreb (Jugoslavio) la 24an de decembro.

MACK REYNOLDS (1917-1983), unu el la plej popularaj kaj fekundaj sciencfikciaj verkistoj de Usono, mortis la 30an de januaro. Multjara, kvankam neaktiva esperantisto, Reynolds utiligis la Internacian Lingvon aŭ iun ĝian varianton plurfoje kiel rakontelemtion. Unu aparte interesa romantrilogio prezentis la formiĝon de granda nordafrika alianco, kie Esperanto, ĉar nekolumbia kaj gente neŭtrala, fariĝis la oficiala lingvo.

JOAN SALA I CAMPAMÀ (1915-1982), fakdelegito kaj kolektanto kun riĉa Esperanto-biblioteko, forpasis en Sabadell (Hispanio) la 28an de oktobro 1982.



● **Fervojistoj:** Laŭ la jarraporto de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEFF), tiu faka organizaĵo en 1982 havis 2538 membrojn, kio prezentas malgrandan kreskon (68 membroj) kompare kun la antaŭa jaro. IFEFF, kiu jam de multaj jaroj estas la plej granda faka asocio en la Esperanto-movado, venontjare festos sian 75-jaran jubileon.

● **Informado:** Esperantista Studorganizaĵo, kiu estas filio de Norvega Esperantista Ligo, organizas de la 17a ĝis la 19a de junio 1983 seminarion pri informado. La seminario, kiu okazos en Drammen (apud Oslo), antaŭvidas prelegojn pri diversaj aspektoj de la interna kaj ekstera Esperanto-informado. Oni parolos ankaŭ pri la kunlaboro inter NEL kaj la norvega Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj, kiu dum la lastaj jaroj eldonis plurajn Esperantajn informilojn. Inter la prelegantoj de la seminario troviĝos ankaŭ funkciulo de la landa asocio de UN-klubo. Norvegaj Ŝtataj

WALTER SONDEREGGER (1909-1982) mortis la 19an de novembro en Zürich (Svislando). Li estis membro, fakdelegito kaj delegito de UEA dum pluraj jardekoj. Sonderegger aktivis por Esperanto precipe en la fervojista medio kaj estis sekretario de la svisa sekcio de IFEFF kaj kunorganizinto de la 8a IFEF-kongreso en Zürich.

KOZO UEDA (1900-1982), antaŭa profesoro pri farmacio en Nagasaki, delegito kaj fakdelegito de UEA, mortis la 27an de decembro en Toyonaka (Japanio). Li lernis Esperanton en 1918 kaj kun Hideo Yagi (iama prezidanto de UEA) fondis Sanko Esperanto-Grupon, kiu generis multajn eminentajn movadanojn en Japanio. Ueda estis malavara subtenanto kaj multjara membro de UEA.

M.H. WEULEN KRANENBERG (1887-1983), multjara membro kaj malavara mecenato de UEA, forpasis la 12an de januaro en Harlingen, Nederlando.

L.J.P. WILLIAMS, antaŭa delegito kaj dumviva membro de UEA, forpasis fine de 1982 en Rotorua, Nov-Zelando.

MIHÁLY DUMITRÁS (1896-1983), delegito en Orosháza (Hungario), forpasis la 20an de januaro ĉi-jare.

Fervojoj donas 50-procentan rabaton al la partoprenantoj de la seminario.

● **Muziko:** Unu el la plej popularaj movadaj kantistoj, Veselin Damjanov, baritono el Bulgario, gastis de la 10a ĝis la 30a de januaro en Hispanio. Damjanov, kiu jam eldonis tri gramofondiskojn en Esperanto, iris al Hispanio laŭ invito de Hispana Esperanto-Federacio. Li koncertis en ses urboj (Madrid, Valladolid, Zaragoza, Barcelona, Villanueva y Geltrú, Sabadell) kaj rikoltis tre laŭdajn recenzojn en la loka gazetaro, kiu samtempe informis ankaŭ pri Esperanto.

● **Muziko:** Kvin porinfanaj operoj de la ĉeĥa komponisto Jaroslav Kadlec estas tradukitaj ankaŭ en Esperanton. La tradukojn prizorgis Josef Cink. Tri el la kvin operoj (*Printempa tago*, *Bestetoj kaj rabistoj*, *Somera rapsodio*) estas destinitaj por malgrandaj teatraj trupoj kaj prezentblaj en la akompano de kelkins-

EL KELKAJ MILOJ RESTAS NUR KELKAJ CENTOJ

Malgraŭ la alta prezo, nun pli ol 2 300 esperantistoj jam posedas ĉi tiun unikantan verkon. Ne mirinde, ĉar la fakuloj epitetas ĝin jene: monumenta verkego (Waringhien), maksimuma kompleteco (Benczik), senprecedenca entrepreno (Régulo), giganta trezoro (Blanke), epopeo (Pool), miraklo de precizeco (Boulton), grandioza (Kurusu), treege valora volumo (Jung), kvazaŭ streĉa romano (Wells). Estas tempo zorgi, ke oni troviĝu en la lastaj centoj de la posedontoj!

esperanto
en
perspektivo

Verkis Ivo Lapenna (ĉefred.), Ulrich Lins (red.) kaj Tazio Carlevaro. Eldonis UEA/CED, 1974. 876p. 20,5x14cm. 65 ilustraĵoj. 40 indeksopaĝoj. ISBN 92 9017 016 6. Prezo: 84,00 (por Nederlando 87,36) gld., plus sendokostoj.


MENDU ĈE LA LIBROSERVO de UEA!

trumenta ensemblo aŭ nur de fortepiano. La aliaj du operoj (*En signo de la suno*, *Pri la granda beto*) antaŭsupozas pli grandajn kaj pli altnivelajn kantistaron kaj orkestron. Pri muzikaj kaj tekstaj materialoj de la kvin verkoj skribu al la agentejo: DILIA, Vyšehradská 28, CS-128 24 Praha 2, Ĉeĥoslovakio.

● **Muziko:** En la 68a UK en Budapeŝto denove prezentiĝos la Internacia Esperanto-Ĥoro, kiel okazis ankaŭ en la kongresoj de Antverpeno kaj Stokholmo. La gvidanto de la Ĥoro jam dissendis voĉajn partiturojn de la planata programo al la membroj de la ensemblo. Ekzistas tamen loko por pliaj bonaj kantistoj, kiuj petu kontakton kun la ĥorestro: s-ro D. Terziev, ul. Milin kamâk 58, BG-1421 Sofia, Bulgario.

● **Virinoj:** Kunlabore kun Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica, Bulgario, la Komisiono pri Virina Agado de UEA organizos kurson por virinoj pri publika parolado. La kurso okazos unu semajnon antaŭ la UK en Budapeŝto, tiel ke partoprenantoj povas laŭdezire poste vojaĝi ĝi.

La partoprenkotizo varias inter 90 kaj 98 \$, depende ĉu vi preferas du- aŭ tripersonan dormoĉambron, kaj inkluzivas ankaŭ ĉiujn manĝojn kaj la programon. Por faciligi la partoprenon de virinoj, kiuj normale ne povus iri pro familiaj devoj, okazos paralelaj aranĝoj por iliaj edzoj kaj infanoj: sportkonkursoj, ĉiuvespera diskoludejo, ekskursoj ktp. Por familianoj, kiuj ne konas Esperanton, estos Esperanto-kurso. Pliaj detaloj estas haveblaj de Internacia Esperanto-Kursejo, p.k. 791, BG-1000 Sofia, Bulgario.



● **Ĉinio:** Fine de marto, en Huhehoto, ĉefurbo de Interna Mongolio, pli ol 200 homoj finis sian elementan kaj mezgradan lernadon de Esperanto. Inter ili troviĝas nacimalplimultanoj de norda Ĉinio, kiel ekz. mongoloj, manĉuroj kaj daguroj, kiuj esperas estonte povi traduki en Esperanton buntajn kaj interesajn legendojn kaj rakontojn de siaj nacioj. Oni planas ankaŭ funkciigi Esperanto-konversacian kurson en junio ĉi-jare.

● **Kolombio:** En la Universitato de Kindio ĉ. 70 gestudentoj elektis oficiale studi la bazojn de Esperanto, kion oni kalkulas kiel parton de la studprogramo.

La granda intereso tiuokaze vekita instigis la organizintojn starigi kurson en la Universitato, kun multnombraj partoprenantoj plejparte geuniversitatanoj.

● **Aŭstrio:** La plej granda aŭstra semajna magazino, *Neue Illustrierte Wochenschau* (eldonkvanto: 172 000 ekzempleroj), nun havas regulan rubrikon pri Esperanto. La rubrikon prizorgas s-ro Josef Klaner, sekretario de Aŭstria Esperanto-Movado.

● **Norvegio:** Norvega Esperantista Ligo pasintjare havis 426 membrojn, el kiuj 311 apartenis al unu el la 15 lokaj Esperanto-klubo, kaj 115 estis individuaj membroj de NEL. Ke la nombro de esperantistoj en Norvegio estas multoble pli granda pravas "sliparo de norvegaj esperantistoj", kiu nun ampleksas 10 377 adresojn en 807 diversaj lokoj tra la lando.

● **Ĉilio:** La novkreita Universitata Esperanto-Klubo de la urbo Valdivia organizis inter la 12a kaj la 15a de aprilo tre sukcesan kaj bone vizititan ekspozicion en ĉambro de la Urbodoma Biblioteko sub la aŭspicio de la urbestro mem.

● **Burundio:** En Afrikon revenis post studado en Jugoslavio Antonio Ntsigana (c/o Nzeyimama Patrice, B.P. 1401 Bujumbura, Burundio), kiu bonvenigas ĉiujn informojn pri Esperanto kaj petas eventualajn vizitantojn al Afriko kontakti lin por helpi lin organizi Esperanto-aktivecojn en Burundio.



Kongresa glumarko nun aĉetebla
Aperis la glumarko por la ĉi-jara UK. Ĝi estas trikolora (verda, oranĝa kaj nigra) kaj kostas 9,00 (10,62 por Nederlando) gld. por 100 memgluaj markoj, inkluzive sendokostojn. Mendu nun de la Libro servo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

● **Ĉinio:** Sekve de la sciigo de la Eduka Ministerio de Ĉinio pri enkonduko de Esperanto en ĉinaj altlernejoj, ĉiam multiĝas interesiĝantoj. Laŭinforme, nun troviĝas cent mil Esperanto-lernantoj, kaj ĉiutage venas al Ĉina Esperanto-Ligo kelkcent aboniloj por la revuo "La Mondo" (parte ĉinlingva), kiun ĈEL lanĉis en 1981, antaŭvidinte la bezonon de miloj da komencantoj. Eble tiu ĉi revuo kun ĉ. dudek mil legantoj estas rekorda inter la Esperanto-periodaĵoj de la mondo.

Persone

● **Wells:** Okaze de la ĵusa apero de "Esperanto lingvistisk set" la aŭtoro John Wells prelegis en la Universitato de Kopenhago pri Esperanto el lingvistika vidpunkto. La kunvenon aranĝis "Lingvistikredsen" (societo de lingvistoj) kaj "Institut for Nordisk Filologi" (Instituto pri Nordia Filologio). Fine de brila prelego John Wells i.a. reliefigis la nesciencecon de la konduto de la dana lingvisto Blinkenberg en UNESKO, Montevideo 1954. John Wells estis en Danlando laŭ invito de la Jubilea Komitato. En la Prelego John Wells argumentis, ke oni ne priskribu Esperanton kiel artefaritan lingvon, ke ĝi ja preskaŭ nur konsistas el naturaj elementoj kaj ke ĝi evoluigas same kiel la "naturaj lingvoj". Ĝi estas la taga lingvo de la Esperanto-komunumo. John Wells ankaŭ priparolis la projekton pri Esperanto kiel pontlingvo en maŝintradukado.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Japanio: Kazuo Yamada.

SOCIETO ZAMENHOF 1983

Belgio: André Degryse; Grégoire Maertens. Brazilo: Murillo C. de Andrade Fraenkel. Finnlando: Harri Tuomola; Liisi Oterma; Sirkka Mattlin. Francio: Claude Haren. Nederlando: A.M.E. van Walsem-Schutte; J.S. Rooke. Svedio: Åke Eldh; Eugen Rytenberg; Martin Säter; Martha Colliander; Signe Stenström. Usono: Armin F. Doneis Sr.; Cecilia Peterson; Thomas A. Goldman; George Rodenborn.

NOVJORKA OFICEJO DE UEA

PATRONOJ (minimumo \$ 100): FR Germanio: Heinrich Nischwitz. Japanio: Tadao Yosida. Usono: Bern F. Wheel; Bernice Garrett; Lucille H. Thompson.

SUBTENANTOJ (minimumo \$ 25): Aŭstralio: Svetislav Kanački. Belgio: Angelos Tsirimokos. Finnlando: Juho Pyykonen; Arvo E. Korpela. Francio: Raymond Doury. Kanado: W.G. Du Temple. Usono: Franklin Montenegro Rodas; San-Franciska Esperanta Regiona Organizo.

AMIKOJ (minimumo \$ 10): Aŭstralio: Eino Loores. Brazilo: Luiz Mario Santos da Silva. Finnlando: Unto Seppälä. FR Germanio: Herbert Busch; Hermann Teichmann. Italio: Gruppo Esperantista Trentino; Renata Bonvicini. Norvegio: Douglas Draper. Sud-Afriko: Henri Wilhelm Appel.

Oficiala Informilo

PATRONOJ DE TEJO 1983

FR Germanio: Alois Eder.

DONACOJ 1983 (Gld.)

ĝis la 29a de aprilo

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Nederlando: H. Bakker (patro) 100,00; J.S. Rooke 300,00. Svedio: J. Hammarberg 10,00; R. Hjorth 100,00. Sumo ĉi-jara 1 451,55 gld.

FONDAĴO CANUTO: Nederlando: J.S. Rooke 300,00; F. Zeiler 62,50. Svedio: W. Malmsten 40,16. Anonima 19,20. Sumo ĉi-jara 926,40.

ĜENERALA KASO: Honkongo: Wong Kenn 69,51. Japanio: Anonima 812,23. Nederlando: E. Burg 35,00. Usono: J. Eisele 27,00. Diversaj malgrandaj 12,75. Sumo ĉi-jara 3 260,11.

PROPAGANDA KONTO: Nederlando: J. v.d. Teems 10,00. Sumo ĉi-jara 40,00 gld.

BUDAPEŝTA OFICEJO (TERMINOLOGIA SEKCIO): FR Germanio: Sino R. Paintner-Trump 1 126,46. Sumo ĉi-jara 2 231,01.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

Helpu nian administradon! Bonvolu ĉiam mencii vian uea-kodon, kiam vi skribas aŭ pagas al la Centra Oficejo.

John Wells:

Lingvistikaj aspektoj de Esperanto

Rotterdam: UEA/CED, 1978. 76p. 23cm. ISBN 92 9017 021 2. Klara kaj klera scienca analizo, laŭ la moderna lingvistiko, de la Internacia Lingvo. Nemalhavebla por la serioza esperantisto! Enkonduko ♦ Fonetiko ♦ Morfologio ♦ Sintakso ♦ Leksiko kaj semantiko ♦ Fonetikaj simboloj ♦ Bibliografio ♦ Indekso de terminoj. Prezo: 12,00 guldenoj.

Tarifo: ĉiu vorto kostas 0,90 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncoj kaj anoncoj ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton pro la ripeta aperigo de anoncoj.

40-jara komercisto-entreprenisto, de jugoslava deveno, 14 jarojn vivanta en Kanado, deziras korespondi pri diversaj temoj kun liberaj sinjorinoj, kiuj ŝatas vojaĝi. Dragan Novaković, P.O. Box 334, Delson, Que., Kanado JOL 1GO.

15-jara lernanto el FR Germanio ŝatas korespondi kun junuloj ekster Eŭropo. Bv. skribi al: Thomas Sieberichs, Wilhelm-Stefen-Str. 91, D-4150 Krefeld 1.

Esperantistaj komencantoj — gejunuloj kaj pli maljunaj — deziras korespondi kun samideanoj en ĉiuj landoj. Bonvolu sendi viajn aĝon, interesojn, nomon kaj adreson al: Motala Esperanto-Klubo, S-591 90 Motala, Svedio.

Ni geedziĝis la 28an de majo 1983. Nova adreso: H. kaj A. Deceuninck-Bollaert, Lusthuizenlaan 1, bus 4, B-1500 Halle, Belgio (☎ 02/360 17 22).

Studi matene, ferii posttagmeze, jen la kursformulo de la Internacia Fiera Altlernejo de Kultura Centro Esperantista, CH-2301 La Chaux-de-Fonds (Svislando). Petu informilon!

Abonu la svisan horloĝgazeton Bonan tagon, kiu aperas trilingve (Esperanto, germana, franca). 10 svisaj frankoj jare por kvar numeroj.

Multan feliĉon portis al la maljunulejo Amby la belegaj kaj simpatiaj salutoj de la 86 geamikoj el 24 landoj. Koran dankon de s-ino M. van Bentum, ŝia onklo s-ro Antono Plukker kaj liaj kunloĝant(in)oj el Nederlando.

60-jara esperantistino serĉas korespondantojn. Astrid Feuk, Söderby Höjden, S-13 700 Västerhaninge, Svedio.

15-jara studento deziras samaĝajn korespondantojn, kies naciaj lingvoj estu la portugala, franca, angla aŭ germana. Li interesiĝas pri historio, geografio, turismo kaj lingvoj. Patrick Petiot, Caixa Postal 96920, BR-28600 Nova Friburgo, Brazilo.

Urantia revelacio: pri tiu temo deziras korespondi Frederick Nietert, POB 1132 Douglas, AZ 85607, Usono.

Naturamika junulara E-grupo serĉas kontaktojn kun similaj grupoj en aliaj landoj. Bonvolu skribi al: Esperanto-Rondo Okresní dům pionýrů a mládeže, ul. Pionýrů 273, CS-383 11 Prachatice, Ĉeĥoslovakio.

18-jara junulo ŝatus korespondi kun aliandaj samaĝuloj: Tufuene Mafuila, p/a Esperanto-Instituto de Zairo, B.P. 13, Lukala (Bas Zaïre), Zairio.

Pri diversaj temoj (bestoj, psikologio ktp) serĉas gekorespondantojn 24-jara polino: Teresa Ziob, ul. H. Savieckiej 32, PL-42-600 Tamonskie Góry, Pollando.

Komencanto, 20-jara, ŝatus korespondi: Reza Azimi, Pir Salman Co., Shokrieh St., Hamedan, Irano.

Malliberulo volas lerni kaj praktiki Esperanton koresponde: J. Calame, Karzero de Thorberg, CH-3326 Thorberg, Svislando.

Migrantaj tendumantoj — en julio de Basel ĝis Budapeŝt; — postkongrese: Vieno, Suda Pollando; Somere '84: Britaj insuloj. Jean Hénin, F-48500 La Canourgue., Francio.

31-jara instruisto interesiĝas pri lingvistiko, literaturo, arkeologio ktp. Skribu al: Fariborz Kuchekizad, No. 2 Juya Alley, Falahati Alley Saadi Ave., Rasht, Irano.

20-jara polo deziras korespondi pri muziko kaj aliaj temoj: Jerzy Kruk, ul. Drułorska 6/24, PL-53-312 Wrocław, Pollando.

Korespondantojn en Afriko, Sud-Ameriko kaj Azio serĉas polaj gelernantoj kaj ilia 35-jara instruisto: Janusz Szczepanowski, ul. Sportowa 12, PL-67-200 Głogów, Pollando.

19-jara studentino serĉas leteramikojn por korespondi pri literaturo, arto, turismo ktp. Aparte bonvenaj estas korespondproponoj el Greklando, Italio kaj Usono: Tatjana Nikitina, str. Kosmonavtov d.10, ap. 44, SU-173016 Novgorod, Soveta Unio.

Kolombia junulo, 22-jara, serĉas korespondantojn i.a. por perfektigi sian lingvoscion: Javier Osma, Cra. 17c, No. 59-37, Bucaramanga, Kolombio.

Toleremaj geedzoj (aĝo: 28 kaj 32), cele al amikiĝo, ekkonus samaĝajn parojn aŭ unuopulojn: Ges-roj Kalc, Esperanto-Klubo, Savickiej 33/18, PL-65-559 Z.G., Pollando.

Pri klasika muziko, lingvoj, filatelo ktp. serĉas korespondantojn 29-jara: Ehrenfried Lier, Mühlberggasse 7, DDR-9412 Schneeberg/Erzgeb., Germana DR.

21-jara studento deziras korespondi kun gejunuloj tutmonde pri ĉiuj temoj: Fereydoun Arabshahi, Shahin-shahr, St. 233 – No.3, Isfahan, Irano.

22-jara studentino pri turismo ŝatus korespondi pri diversaj temoj: Elzbieta Martynowska, ul. Barana 46 m122, PL-42-200 Częstochowa, Pollando.

42-jara fervojisto ŝatus korespondi pri historio, geografio, sporto ktp. Adreso: Tončo Lazev Tonev, str. Kardam 18, BG-4002 Plovdiv, Bulgario.

Precipe kun nederlandaj gejunuloj ŝatus korespondi studento: Juraj Švantner, Ku amfiteátru 1, CS-080 01 Prešov, Ĉeĥoslovakio.

34-jara pola pedagogo ŝatus korespondi kaj interŝanĝi Esperantaĵojn: Tadeusz Grudniewski, ul. Sambora 2/3, PL-83-130 Pelplin, Pollando.

Emerita inĝeniero serĉas seriozajn gekorespondantojn: Ján Ročkár, Kúpeľná 4/1/13, CS-811 02 Bratislava, Ĉeĥoslovakio.

Pri lingvistiko kaj aliaj temoj deziras korespondi tutmonde 31-jara instruisto en gimnazio: Fariborz Kuchekizad, N° 2, Juya Alley, Falahati Alley, Saadi Ave., Rasht, Irano.

Anoncojn ni povas ankoraŭ loki en la nova Libro katalogo de UEA, se vi rapide mendos. Kovrilokon vi povas ankoraŭ mendi. Petu detalojn tuj de la CO.

Jarlibro 1983 estas nun en la presejo. Ŝanĝojn kaj anoncojn ni ne plu povas akcepti.

Pasporta Servo de TEJO jubileas!

La 10a listo
de gastigantoj
de la



FREMURA

Pasporta Servo de TEJO

aperis por 1983.

Ĝi donas 561 adresojn en 50 landoj, kie senpage aŭ mal-multekoste tranokti. La nova eldono prezentas pli da adresoj ol kiam ajn antaŭe, ĝi krome unuafoje inkluzivas mapojn. Kaj la prezo estas rekorde malalta! Pro tio, membroj de TEJO ĉi-jare ne ĝuas rabaton. La libreto (kaj la rajto uzi la servon) kostas 6 germanajn markojn inkluzive sendokostojn (aŭ 5 irpk) de HAPS, p/a Germana Esperanto-Junularo, Postfach 10 14 22, D-2000 Hamburg 1. La pagon vi povas ĝiri al GEJ ĉe konto 337 17-201 (Hamburgo). Ĝi estas aĉetebla ankaŭ ĉe multaj landaj perantoj, kaj de la libroservo de UEA (prezo 6,90 gld. sen sendokostoj).

PRI INTERNACIA LINGVO DUM JARCENTOJ

Kompilis mag. Isaj Dratwer

Eldiroj de filozofoj, verkistoj, sciencistoj, lingvistoj kaj aliaj pri Esperanto kaj la internacilingva ideo. "La tre valora verko de Mag. Dratwer devas esti rigardata kiel suplemento al tiu ĉi libro." (El la antaŭparolo de *Esperanto en perspektivo*.) Dua eld. (1977), konsiderinde ampleksigita kaj ĝisdatigita. 360p. Prezo: 30,00 guldenoj. Ĉefa distribuanto: Libroservo de Universala Esperanto-Asocio.

LA KANCERKLINIKO, kultura, politika, skandalema, ajnista revuo. Direktoroj: LE PUIL/SEPTJE. Presisto: H. ELIK. 4 n-roj jare. La gazeto, kiu ĉiunumere perdas plej grandan nombron da abonantoj! Ankaŭ vi rajtos mal-aboni – sed antaŭe abonu tuj: 50 FF. Pĉk 12 729 73 X PARIS, je la nomo de LE PUIL. Aŭ ĉe UEA: KLIK-g. Provekz. 3 IRK.

SOMERO en GRESILLON

2a-22a de JULIO * **PRELEGOJ**
"la komunikado"

22a-25a de JULIO * **DUALOARA RENDEVUO**
organizita de l. f. koop

25a de JULIO –
2a de AŬGUSTO * **KURSOJ** trinivelaj
por internacia ĉeestantaro

8a –
21a de AŬGUSTO * **ARTMETIOJ**
kaj **ESPERANTO**

fotoarto, ceramiko, ŝtofmozaiko,
kartonprilaboro — gvidataj en esperanto

22a de AŬGUSTO –
3a de SEPTEMBRO * **RENKONTO DE BLINDULOJ**

informoj, aliĝilo : esperantista kulturdomo kastelo Grésillon 49150 BAUGE, Francio

Gaston Waringhien

kaj la ceter' – nur literaturo

ESEOJ V

”Sub titolo, kiun mi pruntis el la ‘*Arto Poetika*’ de Paul Verlaine, mi kolektis la observojn kaj konsiderojn inspiritajn de mia longa intimeco kun nia literaturo. La unuaj du partoj prezentas memoraĵojn pri mia verkofrato kaj analizojn pri kelkaj, ne ĉiam ĝuste apreciataj, verkoj: la lasta celas, sen ridinda aspiro al kompletigo, plu disvolvi la esploron de la komparliteraturo, kiun mi iniciatis en ‘*Beletro.I.*’, kaj, intere, mi ektuŝas iajn delikatajn demandojn pri la traduk-arto. Krome, ĉar estas neeble pritrakti sciencan, eĉ filologian, sen uzo de teknikaj terminoj, mi almenaŭ zorgis klarigi ilin en fina glosaro.”

(el la antaŭparolo de la aŭtoro)

Kiel Waringhien mem klarigas, tio ĉi estas la lasta volumo de eseoj. Ni aldonu, ke ĝi estas krono por la grandioza kvinvoluma trezoro, kiun donacas al ni la plej eminenta eseisto de la Internacia Lingvo.



Kaj la ceter' – nur literaturo,

de Gaston Waringhien. Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto, 1983. 350 p. 21 cm. ISBN 90 6336 031 2. Prezo: Bfr. 700 + 10% da sendkostoj, al poŝtĉekkonto Bruselo 000-0422856-33.

Mendu ĉe TK/Stafeto, Miksebaan 65 A, B-2130 Brasschaat.


Mendebla ankaŭ ĉe UEA (39,60 gld.)

ampleksa faka kajero kontraŭ tre populara prezo!

Sciencaj Komunikaĵoj

Tiu ĉi libro eldonita de la Scienca Eldona Centro de UEA traktas inter alie la jenajn temojn:

- **Pri la hungara spico-papriko**
(D-ino Gál Ilona)
- **Sur la spuroj de la prahistoria homo en Hungario**
(Bernard Golden)
- **Okupiga terapio en la infanhospitalo**
(D-ino Körmándy Györgyi)
- **Novaj evoluoj pri ciklotronoj en la teknologia universitato de Delft**
(Inĝ. Jan Otto de Kat)
- **ktp.**



Sciencaj komunikaĵoj 1982, Redaktis D-ro inĝ. Haszpra Ottó kaj inĝ. Lukács András. Budapeŝto: Scienca Eldona Centro de UEA, 1982. 66 p. 24 cm. Prezo: 6 gld., plus sendokostoj. Triona rabato ekde 3 ekzempleroj. Mendu ĉe la libroservo de UEA.

